

Korespondo (en la pola lingvo) rilate al plua aperado de
Pola Esperantisto. Resumo en Esperanto sur la 4. paĝo.

Wydawnictwo Hejme

Kazimierz Leja



ul. Wąska 21/3 • skrytka 59 • PL 41-250 CZELADŹ
tel. 0609 771 537 • hejme@hejme.com.pl
NIP: 654-000-94-79 • REGON: 271198199

Łódź, 15 września 2007

(Nowowybrany)
Zarząd Główny
Polskiego Związku Esperantystów

w Łodzi

W nawiązaniu do podpisanego przez ustępujący ZG PZE z Wydawnictwem HEJME kontraktu w sprawie redagowania i wydawania czasopisma „Pola Esperantisto”, którego termin wygasa z końcem bieżącego roku, zwracam się do nowowybranego Zarządu Głównego Polskiego Związku Esperantystów o podjęcie decyzji w sprawie przedłużenia ww. kontraktu.

Mam nadzieję, że nowowybrane władze PZE w sposób konstruktywny przyczynią się do zawartości czasopisma oraz jego dystrybucji w swoich szeregach. Czasopismo — według mojej opinii — powinno w dogodnym momencie przekształcić się w oficjalny organ PZE. Na temat kształtu współpracy oraz szczegółów „technicznych” proponuję zorganizować spotkanie w Poznaniu, w dniu 21-22 września br. podczas ARKONES-u.


Kazimierz Leja

BRE Bank SA mBank • 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Od: „Halina Komar”
Do: „Wydawnictwo HEJME”
Temat: Pola Esperantisto
Data: 4 października 2007 20:49

Saluton, posyłam obiecane pismo informujące o decyzjach podjętych w związku ze zbliżającym się końcem kontraktu pomiędzy Pana Wydawnictwem a PZE.

Pozdrawiam – Halina Komar



Szanowna Pani Halino!
Pozwalam sobie w całości zacytować Pani list (z załącznika), a pod spodem moją odpowiedź:



Pan Kazimierz Leja
Redaktor – Wydawca Pola Esperantisto
Szanowny Panie Kazimierzu!

W związku z upływającym terminem kontraktu na wydawanie Pola Esperantisto oraz jego redagowaniem, podczas KZD w Łodzi zostały podjęte decyzje o powrocie tytułu do Polskiego Związku Esperantystów od nowego roku 2008.

Ma to być pismo wydawane jako organ PZE we współpracy z innymi organizacjami esperanckimi działającymi na terenie kraju i – według ustaleń – zawierać także informacje dotyczące działalności całej polskiej Esperancji. W toku dyskusji, wyłoniono także potrzebę zamieszczenia przynajmniej jednego artykułu dwujęzycznego, który pomógłby i zachęcił do czytania także esperantystów początkujących. Zawartość pisma – jego parametry oraz treści podlegałyby ocenie kilkuosobowego Kolegium Redakcyjnego, działającego w imieniu ZG PZE.

Proszę Pana, jako wieloletniego Redaktora PE, o przedstawienie opinii dot. proponowanych zmian oraz propozycji z Pana strony w związku z wygasającym w grudniu 2007 kontraktem z PZE.

Pan T.Chmielik podczas ARKONESU informował, także w Pana imieniu, że definitywnie zrywacie kontrakt i zamierzacie wydawać własne pismo. Pan jednak proszę mnie o odpowiedź, jaka będzie podjęta decyzja nowego ZG PZE, a więc spełniam Pana prośbę, oczekując propozycji z Pana strony.

Dodam także, że rozważam dystrybucję Pola Esperantisto także w formie elektronicznej (pdf), w obniżonej ok. 30–40% cenie, co rozszerzyłoby rynek zagranicznych abonentów. Proszę się do tego także ustosunkować. Z poważaniem

Halina Komar – Prezes ZG PZE



(Odpowiedź)

Podczas naszego krótkiego spotkania w Łodzi, w obecności kol. kol. Edwarda Kozyry i Andrzeja Sochackiego (członków nowowybranego ZG PZE), podzieliłem się swoją opinią nt. przyszłości „Pola Esperantisto”, iż czasopismo powinno na nowo stać się organem PZE, dotrzeć do szerszych kręgów czytelników, szczególnie wśród polskich esperantystów, że PZE przejmując wydawanie PE może nadać mu wyższą rangę, angażując na stanowisko redaktora naczelnego kogoś znanego, np. kol. Romana Dobrzyńskiego.

Jednocześnie sformułowałem, a następnie wysłałem w postaci oficjalnego pisma na adres e-mailowy kol. Roberta Kamińskiego [zob. str. 1 – red.], swoją

gotowość do kontynuowania dotychczasowej pracy jako redaktora i wydawcy (w podtekście, gdyby Zarządowi Głównemu nie udało się w szybkim terminie przejść redagowania i wydawania PE).

Podczas kilku moich spotkań z członkami ZG w Poznaniu, tydzień później, jak również z relacji kol. Tomasza Chmielika z jego rozmów z członkami ZG uzyskałem informacje o dużym postępie przygotowań, m.in. stosunkowo szerokim gronie współpracowników, osobie nowego redaktora (Gabi Kosiarska?), możliwości (chęci?) wydawania PE w Łodzi przez kol. Roberta Kamińskiego.

Wszystkie te ustalenia napawają mnie radością i przekonaniem, iż mój trud „wskrzeszenia” PE przed 5 laty nie poszedł na marne. Mam nadzieję, że kontakty nowej redakcji z wieloma środowiskami zaowocują kiedyś zjednoczeniem ruchu esperanckiego w Polsce, a przynajmniej rozpoczną prawdziwy dialog i współpracę.

Odnosząc się bezpośrednio do pytań, zawartych w Pani liście, mam oczywiście kilka uwag.

Odczucia pozytywne:

1) PE powinno być rozpropagowane bardzo szeroko w polskiej Esperancji.

Chętnie zamieszczę w najbliższych (i ostatnich zarazem) 2 numerach informację o możliwości zaabonowania czasopisma i wszelkich szczegółach „technicznych” – proszę tylko o przesłanie JAK NAJSZYBCIEJ stosownych informacji (aby informacja mogła ukazać się w najbliższym numerze PE, tekst muszą otrzymać najpóźniej w sobotę rano!)*

2) Należy szybko zawiadomić UEA o całej sprawie, aby zdążyli w „Esperan-

to revuo” zamieścić informację.

3) Wydawanie PE również w formie elektronicznej gorąco popieram.

Odczucie negatywne:

4) Pomysł, aby każdy numer PE zatwierdzało „Kolegium Redakcyjne, działające w imieniu ZG PZE” uważam za osobliwy. Moim zdaniem w skład Redakcji powinno wchodzić 1–2 członków ZG, co powinno zagwarantować, że nie ukażą się materiały „nieocenzurowane”, a Rada Programowa – jako ciało doradcze – powinno ustalać – wspólnie z Redakcją – cele strategiczne.

Reasumując, obecny skład Redakcji PE (Tomasz Chmielik, Lidia Ligęza, Kazimierz Leja) uznał, że dalszemu bytowi PE nic nie zagraża, przeciwnie, że jest realna szansa na oczekiwany wzrost poziomu edytorskiego, zarówno w zakresie zamieszczanych treści jak i formy, oraz znaczne rozszerzenie kręgu czytelników. W związku z powyższym uznaję, że z końcem bież. roku – zgodnie z wiadomym kontraktem – nasza misja zostaje zakończona.

Życząc sukcesów nowej Redakcji i nowemu Wydawcy liczymy na dalszą obopólną współpracę, szczególnie w świetle powołania nowego tytułu (kwartalnika), którego charakter i zawartość nie będzie konkurencją dla „Pola Esperantisto”. O szczegółach nowego tytułu poinformuję na łamach grudniowego numeru PE.

Z wyrazami szacunku
Kazimierz Leja

* Do dnia wydania niniejszego numeru PE nie otrzymałem żadnych informacji dot. prenumeraty na rok przyszły.

„SPEGULO“

Spegulo estos kvaronjara revuo kun sociokultura enhavo. Ĝin redaktos la pola kvaropo: Tomasz Chmielik (ĉefredaktoro), Kazimierz Leja, Lidia Ligęza kaj Stanisław Śmigielski (sekretario de la redakcio). Inter la kunlaborantoj estas la nomoj de Zbigniew Galor, Małgorzata Komarnicka, Ilona Koutny, Teresa Nemere kaj Ryszard Rokicki. Atendataj estas ĉiuj samideanoj, enlande kaj eksterlande, kiuj volos pliriĉigi la novan revuon per siaj kontribuaĵoj.

Spegulo estas turnita al leganto aktiva, lingve matura, kritike sekvanta okazantaĵojn en la moderna kulturo, eŭropa kaj monda. En estos en ĝi originalaj poemoj, rakontoj kaj teatraĵoj, kaj ankaŭ tradukoj el la plej diversaj lingvoj. Ni ne volas forgesi la historion de la Esperanto-movado, en kiu ni serĉos imitindajn ekzemplojn kaj indikojn por la estonteco. Interesas nin serioza recenzado de verkoj aperintaj en Esperanto, kaj recenzoj devus analizi la literaturan valoron de tiuj verkoj, ilian lokon en la literatur-historia perspektivo. Multe da aten-

to ni volas turni al la signifoplenaj eventoj kaj aĵoj en la arta vivo. Ni volas eliri el la verda „geto“ kaj interparole kontakti elstarajn personojn de la kultura vivo.

Nin ĉiujn ligas la komuna sperto de tiu memorinda jaro 1989 — *annus mirabilis* — kaj ĉiuj ŝanĝoj, kiuj okazis en la politika kaj socia vivo, kiam finiĝis la komunista regado kaj formiĝis novaj ŝtatoj en la Meza kaj Orienta Eŭropo — en tiu parto de la mondo, kiu estas nia loko surtere. Tial ni volus montri al legantoj la gravecon kaj signifon de la jaro 1989 kaj la sekvo por ni, kiel parto de Esperantujo.

Ni deziras, ke *Spegulo* estu malferma, sen limigaj antaŭkondiĉoj aŭ tendencoj. Ĉiel ni klopodos, ke Esperanto fariĝu perilo inter homoj kun diversaj opinioj, kun malsamaj spertoj. Per *Spegulo* ni intencas konvinki Esperantistojn, ke la Zamenhofan lingvon ili lernas kaj praktikas ne nur por kongresumi kaj plum-amikadi, sed ankaŭ por vastigi siajn pens-horizontojn.

Resumo de korespondado inter PEA kaj Eldonejo HEJME (pĝ. 1–3)

Al la novelektita Ĉefa Estraro de Pola Esperano-Asocio mi sendis oficialan leteron, petante subskribon de plua kontrakto por redakti kaj eldonadi la revuon.

En sia letero, datita la 4^{am} de oktobro 2007, s-ino Halina Komar informis, ke PEA decidis, ke PE revenu komence de la venonta jaro al la organizo, kiel ĝia oficiala organo, kies enhavo estos kontrolata de la Redakcia Kolegio. En multaj interparoloj miaj kaj de kol. T. Chmielik kun unuopaj membroj de la ĈE de PEA evidentiĝis, ke la nova Estraro disponas pri stabo da homoj, kiuj volonte okupiĝos pri eldonado de la revuo. Tion eksciinte, la nuna redakcio decidis fini sian 5-jaran laboron, dezirante al la novaj redakcio (ankoraŭ persone nekonata) kaj eldonisto (PEA) sukcesojn kaj esperante pri la venonta kunlaboro. (Legu supre la informon pri la nova revuo, kiun ni eldonos ekde la jaro venonta).

Kazimierz Leja

ARKONES '2007

Kelkaj rimarkoj surmarĝene de la ILEI-Konferenceto dum ARKONES en Poznano

De jaroj persekutas min kaj teruras la koŝmara sonĝo, ke se morgaŭ registaro aŭ ministro pri edukado de iu ajn ŝtato farus tiun epokfaran decidon — ekde nova lernojaro ni enkondukos devigan instruadon de Esperanto en la lernejojn — tio estus la plej nigra tago en la historio de nia movado. Multaj demandos, kial, ne kaŝante sian ĝojegon, ke plenumiĝos la revoj de ĉiuj bonvolemaj samideanoj. La respondo simplas: mankas ĉio, ni ne havas taŭgajn, modernajn lernolibrojn por ĉiuj tipoj de lernejoj, ni ne disponas pri sufiĉa kvanto da instruistoj, ekzistas nek instruprogramoj, nek metodika helpilaro. Tiu ĉi tago malkovrus senkompatem mizeregon de nia instruado, kvankam — mi substrekas forte! — ne mankas al ni bonaj intencoj kaj volo. Kaj per bona volo estas nur pavimitaj stratoj de la infero, kiel malice diros aliaj.

Mi estas lingvo-instruisto kun preskaŭ 26-jara sperto. De kelkaj jaroj, post kiam Pollando eniris la Eŭropan familion, mi devas multon lerni — jes, karaj! — lerni; mi partoprenas dekojn da metodikaj kursegoj, kursoj, kursetoj, kies celo estas konigi al mi novajn metodojn kaj materialojn pri instruado de la germana lingvo, ĉar mi instruas ĝuste ĉi tiun lingvon. Mi do vidas, kio ŝanĝiĝas kaj kio estas grava en la nuntempa lernejo, por ke fremdlingvojn oni instruu efike.

Ekipita kaj armita per tiuj novaj spertoj mi vidas des pli akre, kion oni devus efektiviĝi sur la kampo de la Esperanto-instruado.

Plej gravas instruistoj. Ni bezonas centojn, se ne milojn da instruistoj, por ke ni povu starigi diversgradajn Esperanto-kursojn. Kiu klerigu ĉi instruistojn? Plej dezirinde estus, ke ni havu filologojn, ĉar sufiĉus nur iom da perfektigaj kursoj. Sed ekzistas arego da instruistoj pri diversaj objektoj, al kiuj minacas senlaboreco pro malgrandiĝanta nombro da gelernantoj. En tiu malfacila tempo Esperanto povus esti ia solvo, ĉar direktoroj de lernejoj havas tiel nomatajn instruhorojn je sia dispono. Mi scias el multaj interparoloj, ke se ili havus trejnatajn, diplomitajn Esperanto-instruistojn ili povus havigi ĉi horojn al ili, kaj Esperanto havus eble historian ŝancon eniri lernejojn kiel studobjekto kun propedeŭtika valoro antaŭ eklerno de nacilingvoj, kiel la angla, franca, germana...

Tiaj instruistoj bezonas formiĝon universitatan kun strikte pedagogia studprogramo, minimume kvarsemestra, al



kiu povus aldoniĝi konoj de la historio de Esperantaj movado kaj literaturo. Mi esperas, ke ĉi tiun rolon povus ludi Poznana Universitato kun siaj postdiplo-
maj studoj.

Instruadon de Esperanto oni ne leĝ-
igas per unusola instruprogramo por ĉiuj kursoj. Ĉi tie ankaŭ estas grandaj ŝanĝoj. Ĉiu lernolibro, kiun ministro pri edu-
kado skribas en la liston de permesataj de-
vigaj lernolibroj devus havi propran in-
struprogramon kaj apartan kajeron kun
dismeto de instrumaterialo, kun listo de
atendataj konoj kaj scioj post ĉiu lecio-
no, kun metodikaj konsiloj, kun testiloj
ktp. Kiu ne komprenas tion kaj neglektas
tiajn procedojn, tiu estas kompatinda kaj
danĝera fuŝulo, komprenanta nenion el
tio, kio okazis dum la lastaj kvin–ses jaroj
en la polaj lernejoj.

Ne sufiĉas ellabori instruprogramon,
devus recenzi ĝin kaj taksu tri recenzan-
toj, inter kiuj estu ekspertoj kun profesora
titolo, rekonataj de ĉiulanda ministe-
rio. Kaj tiu „nukso” povas montriĝi eĉ ne
rompebla, ĉar kie trovi tiajn ekspertojn?

La ŝanco estus prilabori internaciajn
lernolibrojn kun nacilingvaj versioj, kiuj
kunlabore kun landaj edukaj kaj klerigaj
instancoj povus diskuti UEA kaj ILEI. Kaj
ĉi–koncerne ni trovis konkludon, ke tiaj
laboroj devus komenciĝi kiel eble plej
rapide, ke devus okazi la eŭropa kon-
ferenco — provizore ĝia loko estu Bad
Herzberg kun sia centro — dum kiu oni
diskutos ĉiujn problemojn, kaj mi espe-
ras, ke ĉifoje brilas ia lumeto en la fino
de tiu longa tunelo.

Mi esperas samtempe, ke venas la
tempo, kiam ne estos loko por amato-
reco, ke okazados nur profesiaj klopo-
doj. Ke la landaj asocioj komprenos gra-

vecon de Esperanto–instruado, ke pri ĝi
okupiĝos vere kompetentuloj, kaj ne iu
ajn, eĉ se li/ŝi havus plej bonajn intencojn.

Urĝas la tempo, finiĝas la epoko de la
bovolemaj diletantoj! Al ILEI mi dankas
pro ĝia laŭdinda kaj helpinda portalo kun
edukaj materialoj — atendata delonge
kaj nun pli kaj pli utila! Post fruktodonaj
interparoloj kun Zsofia Korody mi vidas,
ke inter ni ne estas diferencoj, ke ni ha-
vas la samam opinion pri mankoj kaj no-
vaj solvoj. Mi esperas, ke sub la nova es-
traro de UEA la Esperanto–instruado
trovos pli grandan atenton kaj novan
elanon, kiun ni bezonegas por liberigi
nin de plurjara stagnado ĉi–kampe.

Tomasz Chmielik



Nova Esperanto–lernolibro por poloj — daŭras preparo

Dum ARKONES estis prezentita projekto
de la nova, moderna lernolibro de Espe-
ranto fare de ĝia aŭtoro — Edward Male-
wicz, delonge malĉeestanta polan Espe-
ranto–movadon.

Laŭ la deziro de la aŭtoro, lernolibro
aperu antaŭ la „pola” UK en Bjalistoko,
en la jaro 2009. Ĝi estos destinita por ko-
mencantoj, enhavos multajn ekzercojn,
dialogojn kaj bildojn, kaj sur akompanan-
ta KD la samaj lecionoj kaj ekzercoj estos
legataj de polaj kaj eksterlandaj esperan-
tistoj.

La aŭtoro de pli ol 30 jaroj okupiĝas
pri instruado de la angla lingvo kaj pasio-
nas pri metodiko. Tio garantias, ke la ler-
nolibro plenumos ĉiujn kriteriojn necesaj
por registri ĝin en la Ministerio pri Edu-
kado (vidu la artikolon de T. Chmielik).

Kazimierz Leja

Interlingvistika sesio kaj instruista trejnado (14-21.09.2007) en UAM, Poznań

La aŭtuna sesio de la Interlingvistikaj Studoj atendis la partoprenantojn kun pli riĉa programo ol kutime, ĉar en la tria jaro de la studoj okazas specialiĝo, ĉi foje pri komunikado, lingvistiko kaj lingvopedagogio. István Ertl prelegis por ĉiuj pri la nuntempa E-literaturo kaj analizis kelkajn verkojn. La kurso de la bone konata psikologo kaj verkisto Claude Piron pri psikologiaj aspektoj de komunikado katenis la atenton de la aŭskultantoj. Ilona Koutny, gvidanto de la Studoj, prezentis lingvistikajn aspektojn de komunikado, i.a. esploris la E-lingvan bildon de la mondo.

Enkadre de la lingvopedagogia specialiĝo, destinita al instruantoj kaj instruontoj de Esperanto, Katalin Kováts, prizorganto de la elstara instruista retejo Edukado.net enkondukis la partoprenantojn al la bazaj faktoroj de lingvoinstruado kaj Maria Majerczak, metodikistino de la Jagelona Universitato en Krakovo, traktis metodikon. Al la programo kontribuis ankaŭ Zsófia Koródy, vicprezidanto de ILEI.

La nuna sesio estis specifa, ĉar la lingvopedagogia specialiĝo realigis en la kunlaboro de UAM kun ILEI, kaj pro tio povis aliĝi ankaŭ kromaj partoprenantoj (7 personoj el 4 landoj). La kunordigita instruista trejnado daŭros unu jaron (kun reta konsultiĝo inter la sesioj). Tiuj ĉi kursanoj sekvis krome minikurson pri literaturo (István Ertl) kaj pri movadhistorio (Aleksander Korĵenkov) kaj povis aŭskulti donace la aliajn proponitajn kursojn de la Interlingvistikaj Studoj.

Kiel tradicie, semajnfine la kultura aranĝo Arkones (ĉi-foje sub la aŭspicio de UEA) amuzis la partoprenantojn per abundaj programeroj: koncertoj (i.a. Anjo Amika, Zuzanna Kornicka, JoMo), filmoj, diskutrondoj kaj prelegoj, kiuj kompletigis la universitatajn kursojn (de Claude Piron, Istvan Ertl, Lidia Ligęza, Tomasz Chmielik, Zsófia Koródy, Ilona Koutny, Stano Marcek, Edward Malewicz, Ryszard Rokicki, k.a.) kaj donis eblecon ankaŭ al la gestudentoj kontribui (ekz. Reza Torabi pri Irano, repa koncerto de Marteno Minich, Peter Balaj pri E@I).

d-rino Ilona Koutny, akademiano



Internacia Festivalo de 36 Lingvoj

Dum 22-30 de septembro 2007 en Bydgoszcz okazis la 32 Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kune kun 28 Pola AIS-Sesio kaj 32 AIS-Sesio – de AIS Klerigejo en Bydgoszcz (AKB).

En la aranĝoj partoprenis prelegantoj, studentoj kaj gastoj el 21 landoj de Afriko, Ameriko, Azio kaj Eŭropo.

Kadre de Internacia AIS-Sesio kursojn-seminariojn je turismaj, kulturaj kaj lingvaj temoj gvidis:

Prof. dr hab. Aleksandra Kowalczyk, Prof. dr hab. Adam Sudol el Pollando, Prof. Boĵidar Leonov el Bulgario kaj ASci Regina Grzębowska kaj ASci Andrzej Grzębowski el Bydgoszcz. Temon „Kulturoj de Ameriko, Azio kaj Eŭropo” gvidis red. Roman Dobrzyński ilustrante per propraj filmoj multajn arĥitektajn kaj kulturajn objektojn de la mondo.

Okaze de Eŭropa Tago de Lingvoj (26.09) okazis tre interesa seminario en

Muzeo de Diplomatiko, kiun gvidis Prof. dr hab. Adam Sudol – direktoro de la Muzeo kaj Prof. dr hab. Andrzej Dyszak – direktoro de la Centro pri Instruado de Pola Lingvo por Eksterlandanoj en la Universitato de Kazimiro la Granda (UKW) en Bydgoszcz.

Fakte la Forumo dum la semajno transformiĝis al Festivalo de 36 Lingvoj (komence oni anoncis 25 lingvojn), dum kiu prelegantoj kaj studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz prezentis 13 lingvojn de Eŭropo kaj Ameriko: red. Roman Dobrzyński – Esperanto, hispana, portugala, Prof. Bojidar Leonov – bulgara, Aŝci Regina Grzębowska – Esperanto, litova kaj pola, Anna Butkiewicz – rusa, Aleksandra Kovyazina – ukraina, Bardhyl Selimi – albana, Chang Cindy el Usono – angla, Abraham Langoume – franca, Valery Khramov – germana, Agnieszka Nieczaj – itala. Sekve 15 denaskajn lingvojn de Afriko prezentis studentoj de tiu kontinento: Abraham Langoume – diola, soce, Ibra Faye – wolof, Henry Paul Djikoune – kreol, serez, Abdoulaye Faye – tukuleur kaj pular, Adolphe Dooch Mwelle – duala, pongo, bassa, Joseph Bicinini Apasa – bembe kaj lingala kaj Moses Simon Gabagambi – suahili, kirundi kaj kinye ruanda.

Azion reprezentis studentoj el Ĉinio per ĉina lingvo kaj el Uzbekio – studentoj parolantaj uzbekan, persan, taĝikan kaj rusan, ankaŭ Kirill Vainer – kazaĥan, An Jong Min – korean, Elbegzaya Batchimeg – mongolan kaj Junko Oshima – japanan – kune 8 lingvoj, sume 36 lingvoj, kio helpis konscii la multlingvecon kaj la problemojn de la interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo.

Okaze de Monda Tago de Turismo (27.09) studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz kune kun la gastoj vizitis Skvaron de Ludoviko Zamenhof kaj promenis laŭ Bulvaro „Esperanto” por vizitado de malnova urboparto. En la Urbodomo ĉiujn gastame akceptis la Prezidento de la Urbo Bydgoszcz mag. Konstanty Dombrowicz, kaj poste, post la vizitado de Bydgoszcz-Venecio kaj de la Ekonomia Altlernejo – kiun bele montris Jerzy Matuszak, studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo pasigis Internacian Vesperon en la Ekonomia Altlernejo kune kun ĝiaj gestudentoj, kie ankaŭ prezentiĝis ensembloj – afrika „AFRIKA UMBA” kaj kazaĥo-kameruna „VALDO”, ankaŭ mag. Lech Zagłoba – deputito de la urbo Bydgoszcz kun repertuaro de turismaj kantoj en Esperanto kaj pola lingvoj.

La Tagojn de la Lingvoj en Bydgoszcz fermis d-ro Cezary Kościelak – Prezidento de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz per prelego pri komputila lingvo, mag. Stanisław Mandrak prezentante la instruadon de Esperanto laŭ metodo de red. Stano Marček el Slovakio kaj inĝ. Aleksander Zdechlik parolante pri sano de turistoj helpe de ALVEO. La lastan vesperon okazis renkontiĝo kun Andrzej Grzębowski – vojaĝanto, kiu vizitis 170 landojn de la mondo kaj jam 8 foje sukcesis vojaĝi ĉirkaŭmonde.

Kiel resumo de la aranĝo estis bakalaŭra-magistra Seminario de AIS gvidata de Prof. dr hab. Aleksandra Kowalczyk – (profesoro de UKW, WSG kaj AIS), kaj Ĝenerala Kunveno de la membroj de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turi-

smo en Bydgoszcz, dum kiu oni decidis ĉiujare okaze de Eŭropa Tago de Lingvoj (26.09) kaj de Monda Tago de Turismo (27.09) kontinui la internaciajn festivalojn de diversaj lingvoj, kio donas bonegan popularigon de scioj pri lingvoj kaj kulturoj en la mondo. Valoras substreki, ke en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz ĉefa prelega kaj interkompreniĝa lingvo estas internacia lingvo Esperanto.

Andrzej Grzębowski



La sekva granda sukceso!

Tiu ĉi jara la XVII Ekonomia Forumo en Krinico (Krynica) Pollando estis planata por 3000 ĉeestantoj. La kvanto de forumanoj estis pli granda je triono.

Riĉa programo kaj gravaj gastoj atestis pri la alta nivelo de la aranĝo.

Malgraŭ tio, ke politikistoj en tiu tempo decidis fini la agadon de nia parlamento, multaj famaj ekonomistoj, politikistoj, sciencistoj, kulturagantoj alvenis al Krinico.

Estis ministro Zyta Gilowska, antaŭaj prezidentoj: de Pollando – Aleksander Kwaśniewski, de Ĉeĥoslovakujo – Waclaw Havel, antaŭaj la unuaj ministroj de Pollando – Kazimierz Marcinkiewicz kaj Marek Belka, de Rumanujo – Theodor Stolojan, komisaro de UE pri Regiona Politiko-Danuta Hübner, Reprezentanto de UNO pri Kunlaboro Inter Civilizoj – Jorge Sampalo, ministroj de komerco kaj mastrumado el multaj landoj, prezidantoj de internaciaj organizacioj

Tamen la plej grava persono, kiu estis la unuan fojon dum la 17-jara historio de Ekonomia Forumo estis honora gasto

profesoro Reinhard Selten Nobelpremiito en fako pri ekonomio.

La profesoro estis invitita al la programo organizata jam de kelkaj jaroj de Esperantistoj en Nova Sonĉo (Nowy Sącz) en la nomo de EEU.

Grandega sukceso estis atingi konsenton de la profesoro por lia alveno el Bonn al Ekonomia Forumo. Kiel ĉiam helpis la signalvorto Esperanto, ĉar la Nobelpremiito propagandas Esperanton, kion menciis eĉ tuj post la ricevo de la premio en Stokholmo (1994).

Post sia alveno profesoro Selten renkontiĝis unue kun la urba registaro de Nova Sonĉo, poste en Urba Kultura Centro kun Junaj Gvidantoj en la kadro de Forumo.

La 7^{an} de septembro matene Reinhard Selten prelegis en Gvida Sesio de la XVII Ekonomia Forumo, tagmeze en programo de Eŭropa Esperanta Unio, vespere prelegis pri teorio de ludoj, pro kio li ricevis la premion.

Tio estis la plej grava ekonomia evento de la Forumo.

Diskutantoj kaj personoj komprenantaj la temon dezirus diskuti ĝis nokto. Antaŭe la profesoro private diris, ke Pollando havis kaj havas feliĉon posedante kapablajn matematikistojn. Certe li havas rajton.

Lia prelego estis dediĉata por sciantoj, ke la teorio de ludoj estas la plej disvolvita fako pri teorio de decidoj, okupiĝas pri logika analizo de situacio en konfliktoj kaj kooperado. La teorio estas simila al la teorio de multaj decidaj eblecoj kaj la teorio de socia elekto.

Ĝi serĉas respondon kiel devas kondukti ludantoj en situacio de plena, aŭ parta konflikto inter si.

Tiun prelegon devus devige aŭskulti politikistoj, kiuj decidis ne laŭ kalkulo ekonomia, sed politika..., aŭ laŭ telefona ordono – tiun opinion esprimis la plej populara ekonomisto en Pollando Robert Gwiazdowski (Centro de Adam Smith, Konsilantaro de Publika Asekuro). S-ro Gwiazdowski estis la plej atenta aŭskultanto de la prelego kaj diskutanto.

Reprezentanto de Patenta Komisiono ĉe EU demandis la profesoron, ĉu la neŭtrala lingvo povas solvi multjaran konflikton en EU por jura reguligo de Unia Patenta Politiko. La profesoro respondis: „jes”.

En tiu ĉi jaro same kiel en la antaŭa, partnero de EF estis Esperanta Eŭropa Unio. Organizanto de la prelegoj estis ĝia prezidanto d-ro Sean O’Riain, kiu interese kaj sprite gvidis la diskuton je temo: „EU – ŝanco kaj krizo de la lingva komunikado”.

Krom la Nobelpremiito partumis Esperantistoj:

Gvidanto – d-ro Sean O’Riain, konstanta reprezentanto de Irlando en Bruselo, prezidanto de Esperanta Eŭropa Unio.

Diskutantoj:

— prof. Witold Stępniewski – vicrektoro de Lublina Politekniko en Pollando

— d-rino Barbara Despiney el CNRS ĉe Sorbono, reprezentanto de UEA en UNESCO – Francujo

— d-rino Aida Cizikaite – lingvosciencistino el Vilnusa Universitato, Katedro de Humanista Fako en Kaunas, reprezentantino de ILEI–Litovujo.

— Etsuo Miyoshi – Prezidanto de Korporacio SWANY – Japanujo. Etsuo Miyoshi estas malavara donacanto kaj subte-

nanto de Esperanto, kies promocio estas celo de lia vivo. Por la reklamo de Esperanto en lastaj jaroj li elspezis ĉ. 600 000 eŭrojn.

Ni estas fieraj pro la gravaj kaj interesaj gastoj. Nia stando aranĝita de Peter Balaj el Slovakujo, priservata estis de Esperanta Junularo:

— Łukasz Żebrowski el Varsovio,

— Tobiasz Kaźmierski el Poznańo

— Agnieszka Świąć el Nowy Sącz

Neniam ĝis nun estis tiom multaj trilingvaj eldonaĵoj informaj kaj promociaj, tre bone preparitaj, kiuj allogis forumanojn.

Ili estis danke al la financa subteno de Esperanto Studies Foundation kaj UEA.

Nia stando lokita en bonega loko kun bonegaj reklamoj estis plej ofte vizitata en Forumo. Jam en la unua tago mankis lernolibroj en la Rusa lingvo.

Dum vespermanĝo de la priservantoj malaperis kelkaj libroj kaj diskaj „Esperanto Elektronike”. Oni ne tuŝis valorajn, kostajn komputilajn akcesoriojn. Tio estas por ni signifa evento.

Nian standon vizitis kaj diskutis pri Esperanto kun la junuloj konataj personoj: Gwiazdowski, Unger, Marcinkiewicz, Kwaśniewski, Płażyński, Havel.

Junulinoj de la beleca konkurso Miss Polonia beligis fotojn kun la gastoj.

Ni sentas nin feliĉaj kaj plenumitaj post la sekva paŝo en la agado por Esperanto.

Mi, kiel la aŭtorino de la aranĝo kaj respondeca pri ĝia realigo, konstatas, ke ĉiu peno estas inda por tia sukceso kaj komuna satisfakcio pro la atingita celo.

Halina Komar

Szczawno Zdrój-feriado

La 41^{an} Internacian Esperanto-Feriadon 2007 organizis Silezia Esperanto-Asocio.

Ĝi okazis en Szczawno Zdrój (Pollando) en la tagoj 18-26 de aŭgusto 2007. Al E-feriado alvenis 40 geesperantistojn de Britio, Usono, Germanio, Italio kaj Pollando.

Dum feriado lingvo-kursojn por komen-cantoj kaj por progresantoj gvidis Roman Dobrzyński, Teresa Nemere el Toruń kaj Grzegorz Pisarski el Wrocławo.

Okazis atrakciaj ekskursoj al Kaste-lo Książ, Urbo Świdnica, proksima ĉarma montaro, ankaŭ al Broumovske steny – montaro en Ĉeĥa Respubliko.

Vesperaj komunaj kantadoj kaj danca-doj plenumis programon.

Ege interesajn prelegojn prezentis Ro-man Dobrzyński kaj Teresa Nemere.

Andrzej Sochacki



Kara redaktoro de PE, la abonon al via gazeto mi gajnis dum konkurso en UK de Florenco. Ĝin mi legas kun intereso. Mem mi estas kunredaktoro de „heroldo” eĉ fo-je aperas en ĝi informoj pri agado de PEA.

[...] Mi esperas ke vi ne neglektos la agadon de polaj E-civitanoj en via bulteno. Mi komentas pri la prepozicio „preter” ta-men ekzistas proverbo de Z. kun tia prepo-zicio: *traflugis anĝelo preter orelo* (pp sub-ita eksilento en konversacio) trovebla en nPIV, paĝo 915. Ankaŭ eblas mem krei pro-verbon — kial mankas al la redaktoro arti-sma inspiro? Ofta eraro estas la vorto „ter-mino” kun signifo dato.

Mi deziras al vi konstantan emon plu re-dakti la eminentan gazeton el Pollando, la lulilo de nia lingvo.

Ruĝ-gefrate vin salutas

Dieter Rooke, senatano el la ruĝa frakcio de E-civita parlamento

RAI en Esperanto eksilentis

Jena mesaĝo aperis en Soc.culture.espe-ranto (pere de Carlo Sarandrea):

Ekde venonta lundo, la unua de okto-bro, la Itala Radio (RAI Internacia) ĉesos elsendi kurtondajn radioprogramojn al eksterlando.

Tio koncernas ĉiujn programojn en ĉiuj lingvoj, escepte (onidire, ĉar nenio estis anoncita, ĉu oficiale ĉu duonoficia-le) de la itala, angla, franca, germana (parte) kaj eble hispana, kiuj restos, sed nur satelite kaj interrete.

Hodiaŭ mi registris la morgaŭan, la-stan programon en Esperanto, kies la-staj vortoj estas „Ĝis ne-reaŭdo; nia pro-gramo en Esperanto estas finita”.

Antonio De Salvo

tradukisto-anoncisto de la Esperanto-programo de 1971 ĝis 2007.

Historio de la E-elsendoj de Radio Romo:
www.international.rai.it/radio/multilingue/presentazioni/esperanto.shtml



Itala Esperanto-Federacio sekvis la tu-tan procedon kaj intervenis interkonsen-te kun la prizorganto de la programo, faris gazetaran komunikon, kontaktis la decidontojn kaj aliajn politikistojn. La espero estis kaj ankoraŭ estas havi la dis-sendon en la reto.

Kiam estos haveblaj aliaj detaloj, se necesos fari la kampanjon ni certe petos la esperantistaron. Se, ekzemple, la de-cido estos tute ne havi dissendojn rete, tiam la afero estos pli malfacila.

Amike

Renato Corsetti

Landa elekta kunsido de PEA-delegitoj

Lodzo, 15–16 de aŭgusto 2007

Partoprenis malnovva estraro, 25 delegitoj kaj 24 gastoj.

Nowelektita estraro de PEA:

1. prezidantino – HALINA KOMAR
2. vic-prezidanto – EDWARD KOZYRA
3. sekretario – ROBERT KAMIŃSKI
4. kasisto – ALEKSANDER ZDECHLIK
5. STANISŁAW MANDRAK
6. ŁUKASZ ŻEBROWSKI
7. HENRYK BUDZIAŁOWSKI
8. ANDRZEJ KISZKIEL
9. ANDRZEJ SOCHACKI

Revizia Komisiono: Zofia Śmistek, Bożena Gierula, Maria Jackowska.

La kunveno estis fruktodona. Multe da proponoj kaj projektoj estis akceptitaj pere de nova estraro. Estis planitaj:

1. Organizado de Pola Esperanto-Kongreso en Lodzo en 2008 j.
2. Aktiva kunlaboro kun PEJ
3. Aktiva kunlaboro kun aliaj polaj kaj eksterlandaj organizaĵoj
4. Prepari oficianan programon por lernado de Esperanto.
5. Eldonadi la revuon *Pola Esperantisto* kiel organon de PEA
6. Organizi kursoj pri financaj aferoj



Korpe kaj mense

Tuj post XXIV Esperantaj Tagoj de Krakovo komenciĝis Sandecia Semajno de Korpa kaj Mensa Aktiveco en Rytro (3–10.06.2007).

Mi naskiĝis en Nowy Sącz, do dum mia infaneco kaj juneco mi ofte estis en Rytro, apartenanta al unu el plej belaj, turismaj lokoj de la ĉirkaŭaĵo, ĉar ĝi kuŝas ĉe vojkruciĝo de montaraj trakoj de Sandecia Beskido. Mi multfoje aŭ kun gekolegoj de liceo aŭ kun miaj fratoj startis tie al Montoĉeno Radziejowa (kun fama Prehyba) aŭ en la kontraŭan direkton al Montoĉeno Jaworzyna Krynicka, ambaŭ plenaj de grandiozaj, foliaj aŭ pinglozaj arbaroj. Ondoj de tordiĝanta apud multformaj kaj multdimensiaj montetoj rivero Poprad kaj restaĵoj de la mezepoka kastelo sur unu el ili igas la lokon ankoraŭ pli pitoreska. Mi bone sciis, ke la aranĝo en tia loko devas sukcesi. Kaj evidente.

La sandeciaj organizantoj, pli ĝuste organizantinoj: Halina Komar, Krystyna Stendera, Jolanta Kieres, Alina Krzywdzińska lokiĝis nin en simpatia, negranda ripozdomo „U Jędrusia” (Ĉe Andreĉjo), sur bordo de Poprad. Tie oni ankaŭ bonguste manĝis kaj antaŭ ĉio lernis Esperanton. La bazan kurson gvidis s-ro Stanisław Mandrak apoge je verkoj (libra kaj filma) de Stano Marček el Slovakio.

Personoj, kiuj ne bezonis la bazan kurson, kiel Grażyna Porada, Teresa Pomorska kaj mi havis pli multe da tempo por montaro, kie ni pasadis longajn horojn. Oni devis komenci de la lokaj rememoroj. La kastelo aspektas nun pli impone, ĉar la restaĵojn oni plialtigis kaj plivastigis, kaj la laboroj ĉe ili ankoraŭ daŭras. La malnova tombejo kun malnovaj arboj

feliĉe ĝojigas okulojn pro interesaj tomboj sur la sufiĉe kruta deklivo kaj pro sciuroj, kiuj exploreme kuras tra la tuta tereno kaj najbaraj ĝardenoj. Domaĝe, ke ne ekzistas jam malnovaj, lignaj konstruaĵoj — i.a. preĝejo kaj vilao, en kiu loĝis mia onklino kun la familio. Anstataŭ ili aperis novaj — la masonita, modernforma preĝejo kun interesaj bronzaj skulptaĵoj, kelkaj vilaoj kaj kafejoj, banko. Ne plaĉis al mi nur setlejo de la dufamiliaj domoj. La solido de ĉiu el ili estis projektita kiel tuto. Memkompreneble kun tipe pola individualismo ĉiu posedanto havis ambicion detranĉi sin de la najbaro. Rezulto estas ege okulfrapa. La doma solido havas unuan duonon ekz. flavan kun ruĝa tegmento, kaj duan bluan kun blanka tegmento. Tio multfoje ripetigis prikonsiderante ĉiujn eblajn kombinojn de koloroj. Vere neĉiutaga atingo de la arto!

Vagante tra la diversaj itineroj ni ĝuis pro belaj pejzaĝoj, kolektis berojn kaj fungojn, sunbruniĝis — mi al grado rare atingebla pro mia malhela haŭto. Reveninte mi ankoraŭ devis kuraci la post-sunajn vezikojn. Inter konataj itineroj ni malkovris la novan, komenciĝantan ĉe Niemcowa — larĝan, ankoraŭ ne pretan ŝoseon, kiu okazis tre oportuna kaj kondukis tra vere belaj, arbaraj anguletoj. Estis ankaŭ ekskursoj por ĉiuj; tre plaĉis al la partoprenantoj la flosa ekspedicio laŭ bordoj de rivero. Unu el tiuj migradoj (al rezervejo de reptilioj kaj amfibioj en mallara lageto kun multegaj vegetaloj) rompita forta tempesto, sed ni sukcesis rifuĝi sub grandan ombrelon, antaŭ fora manĝovendejo. Gustumitaj ĉi-okaze glaciaĵoj de sandecia firmao „Koral” farigis vere granda travivaĵo por lango kaj aliaj sensoj.

Vesperoj estis dediĉitaj al komunaj, societaj renkontoj kun drinketado, dum kiuj ni havis okazon kanti, ridi pro diversaj rakontoj kaj anekdotoj kaj ekzerci Esperanton, ĉar plimulto da rakontaĵoj devis esti esperantlingva.

Pro belega vetero, simpatia societo kaj interesaj okupoj — la semajno, fakte korpe kaj mense aktiva pasis tre rapide. Mi volas ege danki al Halina Komar, prezidantino de sandecia filio de Pola Esperanto-Asocio kaj al la tuta estraro pro la ebleco plensence trapasi la tempon. Kvankam en la aranĝo partoprenis nemultaj personoj kaj ne ĉiuj planoj de la organizantoj estis realigitaj, sed oni povas esperi, ke post jaro, denove post jubileaj XXV Esperantaj Tagoj de Krakovo ni sane kaj entuziasme renkontos en Rytro, aŭ en alia loko de la ĉarma Sandecia Beskido.

Lidia Ligeza

SPEGULO – *socikultura revuo en Esperanto, aperos kvaronjare komence de la jaro 2008.*

La unua numero de SPEGULO aperos meze de marto.

64-paĝaj kajeroj en formato A5, nigra-blankaj, kun kartona kovrilo, estas aboneblaj jam (kiel jarabono por ĉiuj kvar kajeroj).

Prezo por enladaj adresoj: 45 zł (inkluzivas VAT kaj sendokostojn).

Prezo por eksterlandanoj: 18 EUR (+ 6 EUR por eventuala prioritata ekspedado).

Abonojn akceptas:

Wydawnictwo HEJME

**41-250 Czeladź, ul. Wąska 21
mBank:**

**36 1140 2004 0000 3202 3141 1644
BIC / SWIFT: BREXPLPWWBK**

Estimata Sinjoro Redaktoro!

Min ŝokis artikolo de iu virino, kiu riproĉas kontraŭ sinjorino Danuta pro ŝia bonkora konduto pri hundoj kaj ĝenerale pri bestoj. Mi ŝatus citi nur unu frazon responde al tiu „malamikino” de bestoj, la frazon, kiun diris ne mi, sed iu el filozofoj: „Nia rilato al bestoj atestas pri nia homeco”.

Kaj por vi, sinjoro redaktoro, mi sendas mallongan tradukaĵon pri... katino. Eble vi iam profitos ĝin.

Amike

Dorota Burchardt

Urszula Pawlik

Kacunia

Ŝi estis belulino kun okuloj bluaj kiel detranĉaĵo de la ĉielo dum serena somera tago. En nian domon ŝi venis iun oktobran tagon nur por unu nokto, ĉar ŝi estis destinita kiel nomtaga donaco por la lernejkolegino de nia patrino.

Ŝi restis tamen ĉe ni dek ses jarojn kiel naskiĝdonaco por mia patro. Honeste oni devas aldoni, ke la donaco ne entuziasmigis la jubileulon, kiu estis kontraŭ tenado de bestoj en loĝata apartamento. Sed ĉar nia patro ne pri multaj endomaj aferoj povis decidi, li estis devigita rezignacii kaj akcepti la fakton, ke li fariĝis posedanto de siama katino.

Ŝi havis eksterordinaran karakteron, kiun ŝiaj kontraŭuloj difinis kiel antipatian, ŝiaj entuziasmuloj kiel decidan kaj ŝia oficiala zorganto kiel malfacilan.

Dum la unuaj jaroj de sia vivo ŝi disrompis sufiĉe multajn ornamvazojn kaj porcelanajn bagatelaĵojn, kolektitaj fare de multnombraj generacioj, damaĝis dekojn da ŝtrumpoparoj, dispecigis ĉiujn kurtenojn kaj devigis nin ŝanĝi du kompletojn de remburitaj mebloj. Krom tio ŝi detruis unu polvosuĉilon, iamaniere tramordante kablون kaj dispecigante la polvosuĉilan serpenton kaj brosojn. Bildon de tiu ciklono kun brunaj piedetoj kompletigis fervora inteligenteco, eksterordinara inventemo kaj iniciatemo. Rezistemaj klinkoj, globoj ĉe pordoj, pezaj kovriloj kaj varmegaj potoj estis por ŝi neniu obstaklo. Ili iasence provokis ŝin, estis por ŝi kvazaŭ kaprompaĵoj, kiujn oni devas solvi. Unuvorte ŝi estis enkarniĝo de diablo en eleganta, belege kolorigita korpo de siama aristokrato.

La nomon Kacunia ŝi ŝuldas al Krystyna Nepomucka, la ŝatata aŭtorino de mia patrino, kiu verkis kelkajn romanojn pri malperfekteco: „Malperfekta Geedziĝo”. „Malperfekta Eksedziĝo”, „Malperfekta Soleco” kaj fine „Malperfekta Amanto”. En tiuj romanoj la aŭtorino kreis katon kun la nomo Kacunia. La kato, trovita en ruinoj de liberigita Varsovio, apartenis al la kapo de familio — eterna drinkulo. La besteto, kiun li savis de la morto, akompanis sian savulon fidele kiel postebria malbonsento, kiun pole oni nomas „kac”. Ĉar nia kato ankaŭ ne malamamis alkoholon, la patrino ligis tiujn du amojn — amo al la romanoj de K. Nepomucka kaj amo al la kato — kaj anstataŭigis la belan katnomon Tessa per „Kacunia”.

Kacunia preferis dolĉajn ĉampanojn kaj likvorojn. Ŝi scipovis senerare identigi, kiu el la boteloj enhavas ŝian ŝatatan alkoholaĵon. Ŝi ellernis komplikan teknikon malfermi ŝrankon,

identigi la preferatan drinkaĵon kaj eĉ malfermi botelon por gustumi ĝian enhavon.

La tuta historio komenciĝis dum iu malfrua posttagmezo, apenaŭ kelkajn semajnojn post la alveno de la katino sub nian tegmenton. Mi memoras, ke ni preparis nin al akcepto de gastoj, kiam ni trovis nian katinon senkonscia. Ŝi kuŝis kvazaŭ mortinta sub kuireja tablo; eĉ tuŝata ŝi montris neniun signon de la vivo. Ni tuj prenis la mortmalsanan katinon, enaŭtiĝis kaj venigis ŝin al bestkuracejo. Veterinaro akceptis nin tuj pro senespera sanstato de la malsanulino. Li provis diversmaniere vivigi nian amatan siaman katinon, sed sen sukcese. Tio malesperigis lin. Kiam neniue aplikataj medicinaj procedoj donis sanigan rezulton, li verdiktis:

— Bedaŭrinde, mi vidas neniun ŝancon.

Ni, malesperigitaj, vindis la senkonscian katinon per plejdo, delikate metis ŝin en aŭtomobilon kaj veturis hejmen. Tie ni decidis gardsidi ĉe Kacunia — tiam ŝi ankoraŭ nomiĝis Tessa — dum la tuta nokto, ŝanĝante unu la alian post certa tempo. La mortanta kato kuŝis trankvile iom ronkante kaj ni sidis apud ŝi laŭte plorsingultante. Ĉiun unuopanan ronkon de la katino ni opiniis la lastan antaŭmortan signon, interpretante tion jene: „Verŝajne ĉesas funkcii ŝiaj pulmoj aŭ: „Certe ĉesas bati ŝia koro” aŭ: „Ŝi sufokiĝas, la malfeliĉulino”. La noktaj horoj transiris je griza mateno. La griza mateno ŝanĝiĝis je sombra tagmezo. La katino ronkis malpli ofte. Stako da naztuketoj kreskis pli kaj pli rapide.

La patrino ne iris al laborejo, mi ne iris al universitato, mia fratino ne iris al lernejo. La avino, kiu ŝategis la katinon, ne preparis tagmanĝon. Nur la patro kondukis normale, akceptis ĉiutagajn taskojn, irante al sia laborejo.

Dume la kandidatino al la katparadizo iom moviĝis, kion ni kvarope interpretis kiel la lastan antaŭmortan spasmon. Ploreĝante ni komencis adiaŭi nian amatan katinon. Tiuj amplenaj adiaŭoj kaŭzis, ke la malsanulino malfermis siajn nekredible blujajn, en tiu tempo ankoraŭ malklarajn okulojn, levis la kapon kaj ŝancelige staris sur la piedetoj. Tio stuporigis nin. Komparo de la leviĝo de la katino el mortokuŝejo kun la mirakla revivigo de la biblia Lazaro venis en niajn kapojn iel aŭtomate.

Dume la estonta mortintino lamiris per malcertaj paŝoj al siaj bovletoj. Al ĉiu paŝo akompanis kompatinda, korŝira miaŭo. Sed tiu marŝo ne daŭris longe. Ĝi finiĝis sur ĵus vaksigita pargeto. Tie la piedoj de la katino disiriĝis en kvar mondo flankojn kaj ŝi, konfuzita kuŝis sur planko kiel la hundo Pluto de disnejaj filmoj. Pasis sufiĉe multe da tempo antaŭ ol ŝi denove pene ekstaris kaj kontinuiĝis marŝon al la bovletoj. Tie ŝi fortrinkis la tutan akvon kaj ne sen malfacileco saltis en kuirejan lavabon. De tie ŝi rigardis al ni kun petegantaj okuloj. Do ni malfermis la kranon kaj la katino komencis trinki. Ŝi trinkis kaj trinkis.

Observante ŝin, ni konkludis, ke bonŝance tiu mistera malsano evidente ne estas mortiga kaj nia amata besteto travivos. Kompreneble ni tuj informis pri tiu ĝojiga fakto la veterinaron, kiu resaniĝon de la katino ankaŭ trovis kiel mirakla okazaĵo kaj veterinara evento. Maltrankvilis lin nur tio, ke ŝi multege trinkis. Se tiu soifo daŭrus pli longan tempon, ni devus venigi ŝin al la kuracejo — ordonis la veterinaro. Krom tio la veterinaro ordonis certigi al la malsanulino trankvilon, komforton kaj delikatan dieton. En tiamaj tempoj tiu „delikata dieto” postulis de la domanoj sufiĉe multe de sindediĉo, ĉar tio signifis pasi kelkajn horojn en viandovendejaj longaj starvicoj. Sed kion oni ne faros por la mirakle savita resaniĝantino.

La katino rapide resaniĝis kaj jam kondukis normale. Normale ĝis la sekvanta festeno, kiam post la foriro de la lasta gasto denove ni trovis la katinon senkonscia. Nun ŝi kuŝis

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio SUR

En praktika uzado tiu ĉi prepozicio estas montranta:

1. Pozicion de objekto aŭ estulo rilate al alia, kiu estas pli malalta kaj tuŝanta ĝin sen aŭ kun translokigo. Ekz.:

Sur la strando kuŝis multaj sunbruniĝantoj. Sveltaj mevoj sidis **sur** la akvo. **Sur** la arbo sin trovis multaj birdoj (= multe da birdoj). Havante **sur** si preskaŭ nenion ŝi sunumis **sur** la malgranda teraso. Li staris **sur** la bazon kun sia tornistro **sur** la dorso kaj kalkulis ion **sur** la fingroj. **Sur** la ĉefaj stratoj regas ĉiam vigla trafiko. **Sur** Augustowski-kanalo oni konstruis multajn kluzojn. Eterna malkontentulo estas la plej malestiminda homo **sur** la Tero.

2. Pozicion de objekto kovranta tute aŭ parte alian objekton, ne pli malaltan ol ĝi mem: Ekz. Somere la Suno hele lumas **sur** la serena ĉielo. Li kisigis ŝin **sur** la buŝo. **Sur** ŝia vizaĝo aperis rideto kaj poste granda ĝojo ardis **sur** ŝiaj vangoj. Meze **sur** la muro pendis ŝia portreto. Muŝo sidis **sur** la plafono. Ŝi portas okulvitrojn **sur** la nazo. Dum la solenaĵo ĉiuj havis **sur** si konvenajn vestojn.

Li ludis muzikon **sur** gitaro per plektro kaj ŝi ludis Ŝopenon **sur** piano per du manoj, sed neniu kuraĝis ludi **sur** fluto (= ludi fluton).

Rimarko: *Oni diras kutime:* ludi ian instrumenton aŭ ludi muzikaĵon **sur** ia instrumento.



sur la kuireja tablo, ne sub ĝi, kiel antaŭe. Sur la tablo staris multaj malplenaj kalikoj. Nia ekscitiĝo pro la senkonscia katino kaŭzis, ke eskapis de nia atento suspektinda pureco de la kalikoj. Verdire ili estis forlekitaj ĝis la lasta guto, sed tion ni nur multe pli poste konkludis. Kaj nun ni denove perdis la kapojn kaj konstatis, ke mistera malsano la duan fojon atakis nian katinon. Do denove ni vizitis la bestkuracejon kaj la klopodoj de la veterinaro denove estis senefikaj. Kaj la same kiel dum la antaŭa atako de malsano la katino post kelkaj horoj resaniĝis. Nur turmentis ŝin soifo.

Ankoraŭ kelkfoje ni travivis ripetigon de tiu mistera malsano, neniam tamen ni kunigis tiun fakton kun akceptado de gastoj aŭ suspektinde puraj kalikoj, en kiuj devus esti restaĵoj de alkoholaĵoj. Neniam, ĝis la momento, kiam ni hazarde trovis la katinon ... drinkanta. Ŝi sidis trankvile sur tablo kaj fervore lekis restaĵon de likvoro el kalikofundo. Tiam ni komprenis, ke tiun misteran malsanon, kiu senkonsciigis nian aristokratinon, kaŭzis alkoholo. Al bestkuracejo ni venigis ne mortmalsanan, sed mortebrian katinon. Kaj kompaktinda miaŭado kaj turmenta soifo post la mirakla resaniĝo estis normala efiko de postebria stato!

Kiam ni informis pri tiu fakto la veterinaron li apenaŭ volis kredi, ke li provis kuraci ebrian katinon kaj lia bestkuracejo servis kiel... malebriego.

3. Pozicion de estulo aŭ objekto, kiu estas lokita en loko libera, senkonstrua aŭ senkovra: Ekz. **Sur** la aerodromo troviĝis kelkaj aviadiloj. **Sur** la proksima paŝtejo paŝtis sin (= paŝtiĝis) brutaro. **Sur** la kampoj kuŝis jam iome da sterko. Ŝi trovis monujon **sur** la strato. Vintraj infanoj glitkuras (= glitumas) **sur** glacio. Nia ŝipo balanciĝis **sur** la maro. **Sur** la masto troviĝis Esperanta flago. Turiŝtoj haltis **sur** la deklivo de la monto.

4. Ĝenerale la pozicion: Ekz.: Some **re sur** ĉiu paŝo oni povas renkonti feriantojn. Ŝi tendumis **sur** la okcidenta flanko de Jamno-lago. Havante iome da sperto ŝi starigis sian tendon **sur** la flanko de sunleviĝo. Najbareco kun juna viro havis bonan efikon **sur** ŝin. Havante la kapon **sur** ĝusta loko, li forigis ĉiujn barojn **sur** la vojo al ŝi. La konfeso de lia amo troviĝis baldaŭ **sur** lia lango (= li estis preta eldiri sian konfeson de amo).

5. Ĝenerale la direkton (kun akuzativo): Oni jam metis manĝilaron **sur** la tablon. Ŝi metis la ringon **sur** sian fingron kaj kuŝigis sian kapon **sur** lian bruston. Pluva vetero malbone efikas **sur** homojn. Mia najbaro kaptas fiŝojn **sur** hokon. Maljunulo falis **sur** la teron. En la hungara lingvo la akcento ĉiam falas **sur** la unuan silabon.

Rimarko: Por esprimi movon rilate al pozicio oni devas uzi du prepoziciojn (**de** kaj **sur**). Ekz.: Ni rigardis la urbon **de sur** tre alta panoramtuero. Dum la vento kelkaj tegoloj falis **de sur** la tegmento. Mi prenis la libron **de sur** la tablo. Multaj bestoj jam ekstermiĝis **de sur** la Tero (= de sur la tuta tera globo).

Aliaj ekzemploj kun la prepozicio sur: Beno estis ĉiam **sur** lia kapo. Li portis **sur** si la pekon de multaj. **Sur** vin jam falis la

malbeno. Vi havas **sur** vi tre grandan moralan respondecon. Ŝi portas **sur** si la kulpon de infanmortigo.

La prepozicio **sur** funkcias ankaŭ kiel prefiksoido:

surmonta (= sur monto) – Surmonta klimato kaj flaŭro impresis nin.

suriri (= iri alten sur ion) – Li suriris sur la monton Kasprowy Wierch.

surmeti (= meti sur ion) – Ŝi surmetis pansaĵon sur sian vundon.

surtreti (= pezi sur io) – Li surtretis unu piedon de maljunulino.

surverŝi (= verŝi sur ion) – Li surverŝis cementon sur la plankon.

surĵeti (= ĵeti ion sur) – Mi surĵetis kovrilon sur la liton.

surhavi (= porti sur ŝi) – Dum la solenaĵo ŝi surhavis belan robon.

surfadenigi (= meti ion sur fadenon) – Ŝi surfadenigis siajn perlojn.

surpuŝiĝi (= esti puŝata sur ion) – La ŝipeto surpuŝiĝis sur rifon.

surteriĝi (= ektuŝi la teron) – Aviadilo devis averie surteriĝi.

surtablighi (= igi surtabla) – Oni jam surtablighis la manĝaĵon.

surtable (= sur la tablo) – Surtable jam estis diversaj trinkaĵoj.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio **sur** el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko L.L. Zamenhof:

Sur arbon kliniĝintan saltas la kaproj.

Sur ĉiu flanko nur manko kaj manko.

Sur la ŝtelisto brulas la ĉapo.

Kastel' en aero – malsato sur tero.

Sur ĉeval' de najbaro la ŝarĝo ne pezas.

Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo.

Sur lia nuko sidas pli ol peruko.

Sur la ventro veluro, en la ventro murmuro.

Kio en la kapo, tio sur la lango.

Eŭgeno Miĥalski el la proleta skolo de la 1920^{aj} kaj 1930^{aj} jaroj

Eŭgeno Miĥalski naskiĝis la 21^{an} de januaro 1897 en la ukraina urbeto Letiĉev. Siajn infanajn jarojn li pasigis en Mendziboĵ, kie vivis la fama ĥasida cadiĥo kaj kie lia patro trovis laboron ĉe ĵura prokuristo, kaj poste en apoteko. En ĉi tiu urbeto vivis miksite, sed aparte poloj, rusoj, judoj kaj ukrainoj. Pro sufoĥa etoso de klaĉoj kaj reciprokaj akuzoj Eŭgeno estis sendita al Voznesensk, kie li lernis en la vira gimnazio. Ĝuste tie, en la biblioteko, li trovis Esperantan lernolibron de Devjatnin, kaj multajn jarojn poste li skribos jene pri sia unua renkontiĝo kun la internacia lingvo: *La versoj, kiujn mi tralegis en libro: estis la Himno. La ideo de l' Himno min kaptis, la versharmonio min ravis.*

Kiam eksplodis la unua mondmilito, la juna Miĥalski estis vokita samkiel liaj gimnaziaj kolegoj al militservo, kaj en 1916 li venis al la Ĥarkova milita lernejo. Post la februara revolucio (1917) li transloĝiĝis al Saratov, kie li komencis verkadon kaj tradukadon el la rusa literaturo. Li estis kunfondinto de la revuo *Libera torento* (1918). Sur ĝiaj paĝoj li debutis per siaj poemoj. Samjare oni aperigis la poemaron *La unua ondo* kun versaĵoj de E. Miĥalski kaj V. Polĵakov. Rimarkindas la poemo *Torento*, kiu prezentas la pensojn de la juna poeto pri la graveco de Esperanto kaj ĝia literaturo, kaj samtempe fluecon de la poezia frazo kaj ler-

tecon en la elekto de taŭgaj esprimrimedoj, kio malĥasas la veran majstron.

*Verdaj ondoj trabatas graniton,
ĉion voje forportas kun si,
al Malnovo deklaras militon,
belkantante en mova pasi'.
Verdaj ondoj kunportas fervoron,
flamigante per nova rimed',
donas povon, instigas laboron,
pligrandigas fortecon de l' kred',
ŝprucas akveroj de l' Helo,
ŝprucas tra la universo;
brilas perleroj de l' Belo,
ŝutas kolorojn en verso.
Kantas la ondoj pri Vero,
diras pri fin' de turmento...
Vokas la plena libero
verda libera torento.*

Tamen baldaŭ Miĥalski kun fervoro aliĝos al konstruado de la nova socio post 1917. Spurojn de tiu anima ŝanĝo oni trovas en la poemciklo *Fajro*:

*En sang' naskiĝas Amo. El fajr' aperos Vero.
Kaj Belo ekradios el post densega fum'.
Post neniig' disfloros denove tuta tero.
Post longa prema nokto ekbrilos fine Lum'.*

Okazis ankaŭ grava ŝanĝo en lia vivo – en 1918 li edziĝis al Olga Bojko en Voznesensk. Post la nupto la juna paro transloĝiĝis al Ĥarkovo, kie du jarojn poste naskiĝis la filino Aleksandra, kiun

sekvos la gefratoj Anatolij (1922), Alla (1924) kaj Eŭgeno (1926).

Post 1922 Miĥalski ekloĝis kun siaj familianoj en Odeso kaj komencis viglan agadon en la proleta Esperanto-movado. En aŭgusto 1926 li ĉeestis du sinsekvajn okazaĵojn en Sankt-Peterburgo la 3^{an} Tutsovietian Esperanto-Kongreson kaj la 6^{an} SAT-Kongreson, okaze de kiu aperis poŝtmarko, kaj la partoprenantoj marŝis tra stratoj de la urbo, sub verdaj standardoj. Forte aŭdiĝis la vortoj el la kongresa parolado de Drezen: *Esperanto fariĝis potenca ilo en la manoj de la revolucia laboristaro volanta renversi la nunan sociordon kaj starigi sociordon novan, pli bonan kaj pli feliĉan por ĉiuj homoj...*

Estis la finaj jaroj de ia pliliberigo pro NEP, kio evoluigis industrion kaj terkulturon. Tiu evoluo manifestiĝis ankaŭ en la kultura vivo, precipe en la literaturo kun Izaak Babel, Osip Mandelŝtam, Anna Aĥmatova kaj Boris Pasternak, sed ankaŭ en la filmarto kun Sergej Ejzenŝtejn. Ĝuste en tiu favora klimato povis ankaŭ disvolviĝi la Esperanto-movado.

Tamen la partia gvidantaro bridos ĉiujn simptomojn de libereco. En julio 1925 la Centra Komitato akceptis la rezolucion pri la aŭtoritato de la Kompartio super la literaturo. Aŭtune de 1927 komenciĝis la ekonomia krizo pro la rompo de la NEPa politiko, kaj Stalin eluzos ĝin por la milito kontraŭ internaj kaj eksteraj malamikoj. De aprilo 1929 oni persekutas laŭplane kaj organizite ĉiujn oponantojn de la Stalina reĝimo.

Ĝuste en ĉi tiu jaro aperis la poemaro de Miĥalski *Prologo*, kiun en Parizo aperigis SAT, en 2000 ekzempleroj. Ĝi enhavas poemojn, kiuj prezentas la intiman mondon de la aŭtoro, kaj la titolo mem

estas signifa por la okazontaj ŝanĝoj, kiuj sekvis post la revolucio. Kiel strange devis aŭdiĝi tiuj poetaj vortoj, kiam en la lando oni murdadis centojn da honestaj civitanoj, kaj en Ukrainio mortadis milmiloj da kamparanoj pro malsatego, kiun Stalin eluzis kiel politikan batalilon.

*Finigis nokto. En ĉirkaŭprenu
ci kisas min, karesas, flustras kun pasio.*

Susuras silko sur kuseno...

Maten' de l' am', de l' tag' mateno -

*Unua ora sunradio
penetras ĉambron tra kurteno...*

Okulojn ci fermetas, dronas en ebrio...

Leviĝas mi, malfermas pardonon al ĝardeno...

Parfumas mole akacio...

Kaj ĉio vokas, logas al promeno;

kaj spiras vera poezio

en tiu ĉi vilaĝ-edeno.

(el *Amaj melodioj*)

Responde al la atakoj de siaj kritikantoj, Miĥalski aperigos en la eldonejo *Ekrelo* la poemaron *Fajro kuracas* (1932), kiu enhavas la plej politikajn poemojn de la aŭtoro kaj en kiu oni vidas ĉe li personajn transformiĝojn *el individueco al kolektivismo, el anarĥio al konkorda interdependo kaj el senkonscia baraktado al celkonforma batalado*, kion oni riproĉadis sur la paĝoj de la gazeto *La Nova Epoko*. Tiuj poemoj, skribitaj en la jaroj 1930-1931, samtempe estis provo de saviĝo antaŭ persekutado.

Fine de 1931 Miĥalski kun Ludwig Renn fondis IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantaj Verkistoj). Kiam Renn estis arestita (1933) en Germanio kaj fuĝis al Hispanio, por batali tie kontraŭ trupoj de generalo Franco (1936), IAREV estis gvidata de Miĥalski kun Kuzmiĉ, Izgur, Usmanov, Nekrasov

kaj Bourguignon. Kiel organoj de IAREV aperadis *Nova Etapo* (1931-1933), *Proleta Literaturo* (1934) kaj *Internacia Literaturo* (1935). Eldonado de ĉi tiuj revuoj, kies redaktoro fakte estis Miĥalski, kunpuŝiĝis kun obstakloj, kiujn multobligis la komunistaj regantoj. La unua numero de *Proleta Literaturo* (1934) malplaĉis al la Kongreso de Sovetaj Verkistoj. Tio estis averto. Miĥalski komencis laboron pri la epopeo *Forĝejo de l' Homoj*, en kiu li montras, kiel en Sovetio oni edukas per laboro personojn, kiuj estas ĉu krimuloj, ĉu prostituinoj, ĉu politik-malamikoj. Tiel li skribis en *Internacia Literaturo* (1935). Kiel ĉeftemo por lia epopeo devus esti konstruo de la 227 kilometrojn longa kanalo inter la maroj Blanka kaj Balta, kiun duonmiliono da malliberuloj elfosis mane. En la sama revuo-numero li anoncis, ke li ekverkis originalan romanon *Nia vojo*, kiu *disvolvos bildojn de la etapoj en la esperanta movado: for de 'neŭtrala' esperantismo al esperantismo revolucia*.

Miĥalski laboregas, kvazaŭ li antaŭsentus sian baldaŭan morton. Li tradukis poemojn de la ukraino Ŝevĉenko, de la ruso Puŝkin, kaj de la pola revolucia poeto Broniewski. Li anoncis, ke li komencis laboron super *Esperanta sinonimaro*, kaj manuskripte estis preta la ruslingva verko *Skizoj pri teorio kaj praktiko de esperanta traduko*, aperigota ankaŭ en Esperanto. Li konfirmis, ke li esperantigis la romanojn *Kiel hardiĝis ŝtalo* de Ostrovskij, *Virga kampo* de Ŝoloĥov kaj *Milito kaj Paco* de Tolstoj, kiun li finis traduki ankoraŭ en 1929.

En 1934, respondante al la postulo de N. Ŝapiro, ke *la enhavo estu senpolitika*, li aperigis en Varsovio sian poemaro *Kantoj de Amo kaj Sapiro*. Estas la kolekto de

la plej fruaj poemoj de Miĥalski, kiujn li verkis en la jaroj 1917-1919.

Por la semantoj de teroro en Sovetio de la 1930aj jaroj ĝuste la agado en IAREV kaj tiu poemaro, kiun li eldonis en la malamata, burĝa Pollando, estis signalo por ekigi persekutadon. La 16^{an} de marto 1937 oni arestis la poeton, kaj en majo prezentis la akuzon, ke li estas gvidanto de kontraŭrevolucia organizaĵo, kaj en IAREV kasiĝas kontraŭsovetaj trockiistoj. Al la „kulpo” aldoniĝis la poleco de lia patro, soldatservo en la blanka armeo kaj kunlaboro kun eksterlanda (pola!) eldonejo. Por Miĥalski komenciĝis la geheno. Horoj de pridemandoj, kaj ankaŭ de kruelaj torturoj. Komence li rezistis, sed kun tempopaso li subiĝis kaj poste li „konfesis” la nomojn de la homoj, kiujn li varbis por sia „trockista subplanka organizaĵo”, kio rekte venigis ilin antaŭ la ekzekutan plotonon.

Baldaŭ estis arestita Drezen kaj multaj Kievaj kaj Ĥarkovaj esperantistoj. Ili komencis denunci unu la alian. Kontraŭ Miĥalski sian denuncon prezentis Kuzmiĉ el IAREV, ke la gazeto *Proleta literaturo* estis ilo de ĝia fondinto Miĥalski kaj lia amiko, franca trockiisto Bourguignon por ke li povu enpenetri en Sovetion. Denuncis lin eĉ lia Esperanta lernanto! Kelkaj el tiuj, kiujn denunciis la turmentata Miĥalski, faris la samon kontraŭ li. Tiel fermiĝis la cirko de reciprokaj akuzoj kaj suspektoj. La muelŝtonoj de NKVD senkomplete dispistis la vivon de la homoj, kiuj iam klopodis efektiviĝi la Zamenhofan idearon. La sorto de Miĥalski estis sigelita. Laŭ *verdikto de Milita kolegio de l' Supera Juĝistaro de USSR de la 14-an de oktobro 1937 [li] estis verdiktita al V.M.U.N.* [ruse: „La plej alta mezuro de

krimpuno”] – mortpafo. *La verdikto estis plenumita la 15-an de oktobro 1937 en u. Kievo...* (el la arkivo de KGB). Nur en 1958 oni rehonorigis lin per la tribunala verdikto, kaj en 1994 aperis lia *Plena poemaro: 1917–1937* (FEL, Antverpeno, en la serio „Stafeto” n-ro 18).



Karolo Piĉ el la Praga skolo de la 1970^{aj} kaj 1980^{aj} jaroj

Kvankam pensoj turniĝas al Karolo Piĉ, kiam oni pensas pri la Praga skolo, tio estas vero, ke li ne estas la plej reprezentata skolano. Inter tiuj elstaras Jiří Karen (1920-2000) kun la poemaro *Flugilhava ŝtono* (1985); Eli Urbanová (1922) kun 5 poemaroj *Nur tri kolorojn* (1960), *El subaj fontoj* (1981), *Verso kaj larmo* (1986), *Vino, viroj kaj kanto* (1995) kaj *Rapide pasas la temp’* (2003), al ili aldoniĝas ŝia fama, skandalema biografio romano *Hetajro dancas* (1995); Josef Rumler (192-1999) kun la eseoj *Abunde kaj redunde* (1986), kiu donis la idean skeleton por la tuta skolo.

Karolo Piĉ naskiĝis la 6^{an} de decembro 1920 en Litomiŝlo. En tiu ĉi urbeto li pasigis ok jarojn, vizitante la lokan gimnazion. Kiel 17-jarulo li ekkonis Esperanton kaj decidis fariĝi verkisto esperantista. La plej ŝatata celo por liaj migradoj estis la Litomiŝla tombejo, kiu junaĝe allogis lin per ia mistera ĉarmo, meditiva silento kaj reviga kvieto. Post la abiturienta ekzameno li iris al Prago, kie en la Karola Universitato li elektis filozofion je studobjekto. Bedaŭrinde liajn studojn interrompis la invado de germanaj trupoj en 1939. Baldaŭ poste la nazioj fermis ĉiujn universitatojn. Oni likvidis

ankaŭ la esperantistan movadon. Kun kelkaj libroj, aĉetitaj dum la fermo de la Esperanto-asocio, Karolo Piĉ revenis al Litomiŝlo, kie li enskribiĝis al studoj en la Pedagogia Instituto. Ankaŭ ĉi tie li ne restis longe. Li estis vokita al devigaj laboroj apud la urbo Most. Poste oni arestis lin, ĉar li plilongigis la forpermeson, por zorgi pri sia mortanta onklino. Li devis labori pune, tiam li renkontiĝis kun persekutado, vipado, malsato kaj morto. Kaptinte pulmiton, longe li kuŝis en malsanulejo, kaj la militofino kaptis lin hejme en Litomiŝlo. Li eklaboris kiel libroteknisto en la distrikta oficejo de sia familia urbo, kaj poste dum ses jaroj en la urbe-to Poliĉka. En tiu ĉi tempo li aktivigis en la Esperanto-movado. Tra konata samideano Tomaš Pumpr li ekligis korespondadon kun Waringhien, Régulo Perez kaj Lapenna.

Post 1948 komenciĝis arestadoj, minacado, amasa kondamnado al malliberego kaj morto, kiam la ĉefaj komunistoj ekprenis regadon. Iliaj persekutoj tuŝis ankaŭ esperantistojn kaj ilian movadon. Por vivteniĝi Karolo Piĉ laboris dum kelka tempo kiel farbisto de fenestroj kaj pordoj en Litomiŝlo, ĝis kiam amiko-esperantisto helpis al li enposteniĝi kiel kontisto en la komunisto urbestrejo.

Karolo Piĉ ne ĉesigis sian aktivadon por la Esperanto-movado. Li kunlaboros per artikoloj kun Esperanto-gazetoj, kaj precipe kun *Literatura Mondo* kaj *nica literatura revuo*. Nur fine de la 1960^{aj} jaroj li povis forveturi el la lando kaj partopreni Universalajn Kongresojn en Madrido (1968), Vieno (1970) kaj Portlando (1972). En 1972 li fariĝis akademiano. En la gazeto *Starto* li publikigis aron da eseoj: *Por la Zamenhofa Esperanto, La po-*

pola karaktero de Esperanto, La scienc-teknika karaktero de Esperanto, La 15a regulo, La greka anatemo, Superstiĉo de internacieco. Precipe en tiuj lastaj li kritikis akceptadon de internaciaj derivaĵoj. Li estis kontraŭ latinigado kaj grekigado de Esperanto per internaciismoj devenantaj el ambaŭ lingvoj. Li kvazaŭ malderivis kaj malkombinis la Esperanto-vortojn, kiuj originas el la latino, ekz. de la vortoj inkludi kaj ekskludi li disigis ilian radikon kludi kaj derivis la purajn Esperanto-variantojn enkludi kaj elkludi. Tiel komenciĝis la Piĉa vojo al la propra idiolekto (individua variaĵo de lingvo), en kiu li verkos siajn postajn verkojn.

Rekonante nesufiĉon de Esperanto en priskriboj de montaro kaj altaĵoj, li uzados anstataŭ la tradiciaj monteto, monto, montego la neologismojn kiel *hilo*, *kolino*, *kumulo*, *pinto*, *glaciso*, *siero*. Li riĉigis sian lingvaĵon per amaso da novaj vortoj, kiel *hati* (malami), *verberi* (pune bati sen indiko de batilo), *vabanko* (facilanima decido), *kipo* (ŝutamaso), *hunti* (kurigi, rapidigi), *hurti* (abrupti, bruski), *forniki* (malĉaste seksumi). Ofte li enkondukos ĉeĥismojn: *obtirado* – slangajo kun la signifo *prifiki*, ankaŭ *preni nanon* (drinki glaseton da forta brando), *ĉiĉo* (katino kaj metafore knabino), *buĥto* (ĉeĥa rektangula kuko, metafore knabino kaj ŝia vulvo). Atakojn kontraŭ Piĉ elvokis tiuj ŝanĝoj, kiuj modifas la Fundamenton. Estas vortoj sen finaĵo (adverboj, konjunkcioj) kaj novaj afiksoj: *ak* (plifortigita kaj) *aŭtem* (sed, tamen, ja), *enim* (nome), *erst* (ne pli frue ol, nur), *forsin* (eble), *graŭ* (ĝuste tiel), *ĝus* (ĝuste tiam), *mej* (malplej), *men* (malpli), *nam* (ĉar, pro tio, nome), *nelge* (antaŭ nelonge), *nok* (ankoraŭ), *olim* (jam antaŭ lon-

ga tempo), *sovente* (ofte).

Atakata, nekomprenata, iafoje mokata Karolo Piĉ verkis ĉefe por la tirkesto. La rompo de silento ĉirkaŭ li estis la plej fama aŭtobiografia romano *La litomiŝla tombejo* (1981), kiun aperigis Reinhard Haupenthal. Kun granda zorgemo en la Haupenthala eldonejo lltis la tagan lumon ekvidis pliaj verkoj de Piĉ: la poemoj *Angoro* (1982) kaj *Obsedo* (1984), la romanoj *La mortsonorilo de Chamblay* (1983), *Klaĉejo* (1987) kaj *Ordeno de verkistoj* (1997), la novelaro *La Bermuda triangulo* (1989) kaj du esearoj *La interna vivo de Esperanto* (1995) kaj *Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto* (1999). Multaj aperis jam *post mortem*, ĉar ilia aŭtoro forpasis la 15^{an} de majo 1995.

La litomiŝla tombejo estas historio pri la vivo de viro (Piĉ), ekde infanaĝo ĝis maljuniĝo. Per liaj rakontoj oni malkovras travivaĵojn el la lernejoj, universitataj studoj, dumviva restado en koncentrejo, profesia laboro kaj esperantista agado, sed antaŭ ĉio ni intimiĝas kun liaj seksaj revoj kaj spertoj, el kiuj multaj ŝajnas nur puraj fantaziaĵoj.

Ekde la unuaj paĝoj ravas priskriboj kaj rakontfluo. Per malmultaj frazoj Piĉ kreas lertege kaj verve la etoson, en kiu svarmas objektoj, forgesitaj odoroj, aromoj, koloroj, gustoj. Jen kun kia majstreco li desegnas la bildon de sia infanaĝa hejmo:

Aĝa domo sur la placo. Jen via plej malnova rememoro. Aĝa domo kun longaj, malhelaj koridoroj kaj ŝtuparoj. Vi tre timis ĉiam, kiam vespere vi devis iri tra ili sola. Aĝa domo kun kvadrata korto, kun granda, vitrumita ateliero de fotisto, kaj kun longa, mallarĝa ĝardeno tro streta kaj kvazaŭ kunpremita. En tiu ĝardeno

kreskis nur kelkaj arboj kaj preskaŭ neniam herbo, kaj ĉiam ĝi estis iel neglektita kaj dezerta, nezorgata kaj malgaja.

Sed en la domo estis eĉ vasta subtegmento kun multa fatraso kaj kun kestoj, kofroj, ŝrankoj kaj aliaj ujoj, el kiuj ĉiu entenis aventuron kaj surprizojn. [...]

Estas vespero. La lampo brulas. Tra ĝia blanka kloŝo filtriĝas trankviliga flava lumo. La patrino portas tablen panon kaj vaporantan supon. Kaj la ĉambro aspektas preskaŭ feste kaj solene. (p. 14-15)

En la priskribojn de la vivojaroj fojfoje enŝteliĝas observoj de virinaj mamoj, ventroj, femuroj, koksoj, pugoj. Tiuj virinoj nudigas sin aŭ estas nudigataj. Precipe logas kaj samtempe timigas la protagoniston vulvoj:

Virina vulvo tie krias pri la vira spermato. Ĝi petas. Ĝi logas kaj persvadas. Ĝi soifas. Longegaj tremoj kaj ondado. Ŝia sino jukas kaj frenezas. Ŝia sino estas kratero, kretacea maro, varma vivgenera buljono. Ŝi ardas kaj pasias. (p. 92)

En la scenoj de seksumado aŭ sinmasturbado Piĉ montras nesupereblan spektokapablon. Liaj priskriboj surprizas per ia senbrideco, eĉ besteco, kion spronas la intenseco de volupto, ardo kaj urĝo:

Kaj hejme ŝi sin masaĝas. Ŝi detiras la tolaĵojn. Ŝi metas sin kanapen. Sub sin ŝi kunĉifas kusenon aŭ alian molaĵon. Kaj poste ŝi sin rulas. Lantrime, regule ŝi premadas la vulvon al la kunvolvaĵo. La klitorio brulas, jukas kaj rigidas. La buĥtino ŝvite malseketas kaj humidas, ĝis ĝi ne eltenas tion plu. Ema elfleksas sin. Kaj la vulvo ekcukiĝas... Kvinfoje, dekfoje, dekkvinfoje sinsekve. Ema henas kaj ĝemas, aĥas

kaj hoas, distiras la femurojn, saltetas sur la volvaĵo, levas la krurojn tiel, ke kalkane ŝi preskaŭ tamburas la spasmantan pugon... Kaj, anhelante, ŝi restas kuŝi dissternita... (p. 140)

En la romano ne mankas ankaŭ komikaj kontrastoj. Ili malkovras ĝis medolo la vivon de la protagonisto, kiu certe estas Piĉ:

Sur la lago glitas barko. Akvo plaŭdas. En la barko sidas Libuŝa kaj vi. Libuŝa havas blankan veston kaj nenion sube. Kaj en la krepusko vi ne plu distingas, kio estas tolo kaj kio karno kaj korpo, kio nigra ombro kaj kio la nigro de la sino... [...]

Sed... Por la Kolegio vi verkis akron da studoj kaj prelegoj. Esperantaj neologismoj. La supersignitaj literoj en Esperanto. (p. 115)

Fascina subventro kun malhela densaĵo de la sino. Harumita virinorgano. Certe ŝi estas sola. Certe ŝi ne havas viron. Certe ŝi ĝemas sub vipoj de pasio kaj knutoj de avido. Kaj certe ŝi elmontras kaj elponas sin intence. Por parlogi iun...

Sed vespere vi estas hejme kaj gluas verson al verso kaj metas rimon al rimo. Doktoro Pumpri vin instigas. Kaj viaj unuaj poemoj komencas aperi en Esperanto-revuoj. (p. 120)

La litmoŝla tombejo malbridas plej kontraŭajn sentojn ĉe la legantoj: de abomeno, furiozo ĝis admiro kaj ravo. Certe ĝi estas verko grava, unu el la mejloŝtonoj de la Esperanto-literaturo.

Krome valorus aldoni, ke samkiel Metropoliteno de Vladimir Varankin La Litomiŝla tombejo estas ankaŭ romano pri la verkado de romano.

Spomenka Ŝtimeć – la granda damo de la Esperanta literaturo en la turnopunkto de la 20^a kaj 21^a jarcentoj

Spomenka Ŝtimeć naskiĝis la 4^{an} de januaro 1949 en Orehovica apud Ĉakovec. Post lernado en Varaždina gimnazio, kie ŝi esperantistiĝis en 1964, ŝi diplomiĝis en Zagrebo pri germana kaj franca lingvoj. Samjare, en 1972, ŝi venis al Internacia Kultura Servo (IKS), kie ĝis 1994 ŝi profesie laboros por Esperanto. Ŝi helpis en organizado de Pupteatra Internacia Festivalo inter 1968 kaj 1982. Ŝi gvidis Esperanto-kursojn en elementaj lernejoj de Zagrebo kaj Velika Gorica. Kun Tišljar, Spolarec, Sović kaj Imbert ŝi aŭtoris la Esperanto-lernolibron por komencantoj – *Udžebnik esperanta* (1978), kiu poste estos konata kiel Zagreba metodo, kaj tradukita en dekelkajn lingvojn ĝi furoros tra multaj landoj sur ĉiuj kontinentoj. Ŝi kunlaboris kun esperantaj gazetoj *Heroldo de Esperanto*, *Esperanto*, *El popola Ĉinio*, *Tempo*, *Monato*. En multaj kroataj gazetoj aperis nacilingve ŝiaj artikoloj kaj raportoj pri Esperanto-vivo. Post 1996 ŝi redaktoras la revuon de KEL – *Tempo*. Ŝi organizis kun lokaj Esperanto-societoj kvar unuajn kongresojn de kroataj esperantistoj en Zagrebo (1997), Varaždin (1998), Osijek (1999) kaj Đurđevac (2000).

De jaroj ŝi estas sekretario de Esperantlingva Verkista Asocio. Ofte ŝi gastprelegas en diversaj landoj kaj gastinstruadis pri Esperanto en usonaj universitatoj de Hartford kaj Sanfrancisko.

En sia familia bieneto (Njeguŝ), kiu troviĝas en la vilaĝo Hraščina-Trgovišće ŝi aranĝis 4 internaciajn renkontiĝojn

kun Esperantaj verkistoj. Ĉiufoje partoprenis kelkdeko da kroataj esperantistoj kaj multaj gastoj el la eksterlando.

Spomenka Ŝtimeć estas unu el la plej konataj kaj famaj Esperanto-verkistoj nuntempe. Ŝi debutis per la romano *Ombroj sur interna pejzaĝo*, kiu havis du eldonojn en 1984 kaj 1996. Kun vigla intereso ĝi estas legata ĝis hodiaŭ. Estas la romano pri ama rilato inter esperantistoj, kiuj venas el diversaj landoj. Ĝi komenciĝas en la momento, kiam la amo finiĝis, kiam ombroj vualas la internan pejzaĝon de intima kuneco kaj kuna ĉiutageco. La protagonistino devas kunpuŝiĝi kun diseco kaj ekseco, kiuj rememore penetros fojfoje en ŝiajn klopodojn al kutimiĝi al forlasiteco, akcepti aŭ malakcepti la situacion de eksulino. Ŝi devas malkovri kaj rekoni ĉiujn sentojn kaj reagojn.

Aparte interesa por la legantoj montriĝis la fakto, ke la ĉiutaga vivo okazas meze de Esperantujo. Ĝuste estas rakonto pri esperantistoj, kiuj vojaĝas al kongresoj, korespondas, trovas amon, komencas novan vivon kiel geedzoj malgraŭ ĉiaj diferencoj, kiujn ili klopodas venki, sed povas okazi ankaŭ tiel, ke ili elreviĝas kaj unu forlasas la alian kun ŝarĝo de reciprokaj akuzoj, riproĉoj, plendoj.

En *Ombroj sur interna pejzaĝo* manifestiĝis tiu genia kapablo de Spomenka Ŝtimeć, kiu aperados en ŝiaj postaj verkoj. El centoj, miloj da bagateloj en la ĉiutage vivo ŝi kapablas eltrovi la plej trafajn kaj signifoplenajn detalojn, kiuj spronas, vekas kaj malbridas la plej intimajn kaj profundajn sentojn ĉe la legantoj:

Inter lia foriro kaj mia solseno la nokto

ekkonstruis sian unuan matenon. Mi revenas liten. La polmo metita subvangen por doni falsan impreson, ke iu ĝin varmigas. Mensogo! Tio estas mi! Mi mem!

Diskrete mallumigi la lampon! Neniu movo por ne vekti la triston, kiu laca endormiĝis.

Mateno grizigas la ĉambron. Li kutimis fermi ŝutrojn, mi ne. Tial nun la mateno aperas frue kaj grize kolorigas leviĝon.

– Vi devas mem fermadi ŝutrojn ĉiuvespere! – komentas la voĉo aferece.

Precipe impresodona estas la epizodo, en kiu prezentiĝas la feliĉa tempo de kuneco, sed kvazaŭ ombro de ĵaluzo, kulpo kaj maltrankvilo jam etendiĝas super la memoro pri fremda virino – antaŭa kunulino de la edzo. Jen kiel majstre Spomenka Ŝtimec vestas la turmentajn sentojn de la protagonistino per la simpla lingvaĵo, tamen riĉa je valoroj kaj nuancoj, kiuj pulsas sub la krusto de vortoj:

Kiam mi alvenis liaurben li diris ke mi konatiĝos kun lia eksedzino. Mi ne tro sci-volemis. Ial mi fartis malkomforte. Mi preferus vidi ŝin de malproksime por ne devi paroli kun ŝi. [...]

– Ĉu vi volas ke ni vizitu ŝin hodiaŭ? – li demandis iun posttagmezon. Li ne diris ŝin, li uzis ŝian nomon. Mi preferus diri ne, sed mi akceptis. Ĝi iam okazu. Mi atendis dum li laĉis siajn ŝuojn. La laĉado ne longe daŭris. Mi ekdeziris ke ŝi ne estu hejme. [...]

Kiel impresas renkonti sian eksedzinson?

Ĉu dum konversacio ne enŝteliĝas ilia unua supo el poreo, komune kuirita iun foran posttagmezon? Tiu supo kaj tiu posttagmezo apartenas nur al ili. Neniu povas ĝin kundividi. La fakto, ke mi ĝin en-

kapigis, estis nur vana klopodo, eniri ilian vivon antaŭ ol en ĝi estis mi. [...]

Mi pensas pri tio kiom da fojoj Jan malfermadis konservaĵojn por ŝi. Vespermanĝo. Oni serĉas pri iu neŭtrala temo kaj trovas ĝin.

Post Ombroj sur interna pejzaĝo aperis kelkaj romanoj pri la intima vivo de protagonisto, kiel *La litomiŝla tombejo* de Karolo Piĉ, *Hetajro dancas* de Eli Urbanová, *Fajron sentas mi interne* de Ulrich Becker kaj *Adolesko* de Blazio Vaha. Tamen la verko de Spomenka Ŝtimec elstaras stile, allogas per enhavo kaj ĉiam denove estas malkovrata de novaj legantoj.

La novelaro *Vojaĝo al disiĝo* (1990) entenas kontribuojn de Spomenka Ŝtimec al Belartaj Konkursoj (ekde 1978), kiuj disfamigis ŝin. Dudek du mallongaj tekstoj respregulas temojn prenitajn el la „granda vivo”, inter kiuj ne mankas amo, morto, timo, milito kaj paco.

Du aliaj libroj *Nesenditaj leteroj el Japanio* (1990) kaj *Geografio de miaj memoroj* (1992) prezentas impresojn de la aŭtorino post ŝiaj vojaĝoj tra landoj de Azio, Ameriko, suda kaj norda Eŭropo. Maltede kaj atentokapte Spomenka Ŝtimec rakontas pri viditaj lokoj kaj pri homoj, kiujn ŝi renkontis dummigre. Ŝia prezento-maniero konsistas en tio, ke ŝi metas diversajn observojn apud siaj pensoj kaj sentoj. Tamen en tiuj klopodoj ne manifestiĝas la ĉio-scio de la rakontanto, ankaŭ la legantojn ŝi devigas al la peno konkludi kaj malkovri rilatojn inter homoj kaj eventoj.

En *Nesenditaj leteroj el Japanio* longe impresos kolekto de ses rakontoj *Flustras Hiroŝimo*, kiuj priskribas spertojn

de kelkaj viktimoj, kies vivon detruis kaj ŝanĝis la atombombo.

Kroata milita noktlibro (1993) enskribiĝas – kvankam Esperantlingve – en aron da primilitaj verkoj en la kroata literaturo. Skribante ĝin en Zagreba kelo dum bombatakoj, la aŭtorino prezentas realon, al kiu ĉiu leganto devas vole-nevole rilati per siaj emocioj kaj per la sento de la solidara kuneco kun viktimoj de tiu milito. Surprizas la maniero, laŭ kiu Spomenka Ŝtimeć montras la kruelecon de politikaj agoj kaj faroj kaj ilian efikadon sur la vivon de la homoj, sed ankaŭ sur ilian pensadon, kiu foje restas blinda aŭ surda je teruraĵoj okazantaj ambaŭflanke de la batalfronto. Neforgeseblaj estos la rakontoj pri dentisto René-esperantisto, pereinta en la disbombita Vukovarr aŭ pri Koka, saviĝinta eskape el la koncentrejo de Omarska.

En tiu paĝonombre modesta libro Spomenka Ŝtimeć fajlis la propran stilon ĝis nekredibleco. Ŝia kapablo vekas kaj kapti la atenton de la leganto per multaj vortoj pri areto da trafaj detaloj atingis sian pinton.

Kaj longe en la oreloj de ĉiu leganto sonas la vortoj: *Ne gravas, kiu komencis la unua, kiom da fojoj... Mi al neniu koleras, ĉar mia edzo estis mortigita. Ne daŭrigu!... Estu ni la komenco de la paco, pri kiu ĉiuj parolas* – kiujn aŭdigas la vidvino de kuracisto Pero, alia esperantista viktimo, dum la enterigo.

La romano *Tena. Hejmo en Mezeŭropo* (1996) estas la provo epizode kaj mozaike prezenti la vivon de la avino de Spomenka Ŝtimeć. En la romano aperas ŝiaj prageavoj, onkloj, praboonkloj kaj parencoj. La aŭtorino deziras teksti el la eretoj de ilia vivo la buntan murtapiŝon, ki-

limon, kiu montros la vivon dum kelkaj generacioj en vilagoj kaj urbetoj de neprecize difinebla parto de Mezeŭropo. Tiu ĉi terpeco fariĝis kvazaŭ la Singera bildo pri la pereinta juda vivo, kies centron formis la varsovia strato Krochmalna (Amela). Ŝi uzas la saman manieron, kiel tiu genia juda verkisto. Ŝi klopodas ĉiel konstrui la mondon de Tena, kaj samtempe la mondon de sia propra familio, kun ĉiuj kutimoj, moroj, gustoj, odoroj, koloroj, sonoj, propraĵoj kaj apartaĵoj. Do, gravas ĉiu peceto, ereto de objektoj, ĉiu nuanco de sentoj. Ili devus sproni la tavolojn de la memoro ĉe la legantoj kaj tiel elvoki bildojn de la pasinteco el iliaj travivaĵoj kaj emocioj.

Du sekvaj romanoj *Tilla* (2002) kaj *Hodler en Mostar* (2006) estas kvazaŭ enprofundiĝo en la biografiajn temojn.

La protagonistino de *Tilla* estas fama aktorino Tilla Durieux, kiu grandan parton de sia vivo pasigis en Kroatio. Fuĝante kun sia edzo, juda entreprenisto, el Germanujo antaŭ persekutoj de nazioj, ŝi venis al Zagrebo. Post kiam germanaj trupoj invadis en 1941 Jugoslavion, la edzo de Tilla estis kaptita kaj deportita al Germanujo, kie li pereis, kaj ŝi pasigis ankoraŭ 12 jarojn en la kroata ĉefurbo, sen koni la kroatan lingvon! Ŝi trovis novan kunulon kaj klopodis vivi malgraŭ amaso da obstakloj. En la lasta ĉapitro de la libro Spomenka Ŝtimeć frandigas al ĉiuj legantoj sian mirindan stilon:

La najbarino konservis la parfumbotleton de Tilla. Se oni dum suna tago flaras ĝin, nenio sentebblas. Sed aŭtune, kiam la nebulo kovras la korton de Jurjevskaja kaj kolomboj kunsidiĝas por varmiĝi sur la breton de la ronda tegmenteja fenestro,

iu malfortaodoro leviĝas el la botelo. Tiel odoras la pasinteco. (p. 175).

Pri siaj motivoj skribi la plej lastan romanon *Hodler en Mostar* Spomenka Ŝtimeć skribis: *Beletre vivigi unu el la modelinoj de F. Hodler por stimuli legantojn interesiĝi pri la reala Hodler patro kaj Hodler filo. Atentigi, ke en Sarajevo, la urbo, kiu ege suferis, troviĝas io rilatanta al nia Esperanto-kulturo.*

En 1914, post la morto de sia edzo, Jeanne Cerani, francino, Hodlera modelino, eklaboris en lazareto, kie ŝi asistis operaciojn ĉe militviktimoj. Tie ŝi konatigis kun Mehmed Ĉiŝić el Mostar (Bosnio-Hercegovino). Ŝi edziniĝis al li kaj ili forveturis kune en Usonon kaj Kanaĉon. Tie ŝia edzo reprezentis la jugoslavian registaron. Poste ili revenis en Balkanon, kie Jeanne vojaĝis tra Beogrado, Mostaro, Niŝ. Ŝi malkovris la mondon sovaĝan por la propraj imagoj kaj fremdan kun sia turka mentaleco. Kiam ŝi mortis en 1955 en Mostar, postrestis 280 Hodler-bildoj, kiujn ŝi kolektis aŭ heredis, kiam ŝi estis lia modelino kaj amatino de 1901 ĝis 1916. Tiu kolekto trovisian lokon en la Artista Galerio en Sarajevo. Kiam en 1978 oni prezentis grandan parton de ĉi tiuj pentraĵoj en Berno, montriĝis, ke unu triono estis fuŝita kaj enhavis surpentraĵojn de Jeanne. Post la militofino en 1992 oni renovigis la difektitajn bildojn kaj rekonstruis la detruitajn Sarajevan muzeon, kie tiu ĉi trezoro estas nun prezentata.

Hodler en Mostar estas biografia-historia-geografia rakonto pri Jeanne-Cerani-Ĉiŝić, en kiu Spomenka Ŝtimeć majstre kunplektas diversajn veftojn tiel, ke ili interkruciĝas, pli densigante la bildon de la realo.

La legantoj de la revuo *Literatura Foiro* elektis ĉi romanon verko de la jaro 2006. Tiel oni honorigis la aŭtorinon, kies libroj heredis enhave la plej interesan kaj stile la plej majstran, kion dum jardekoj senlace pliriĉiĝis, perfektigis kaj fajnigis ĉiuj slavaj verkistoj en la Esperanto-literaturo.

prilaboris Tomasz Chmielik



Lidia Ligeza

Etrakontoj

Urseto

En malmulte videbla angulo de mia loĝejo sidas bruna, mola, sufiĉe granda urseto kun okuloj el butonoj kaj ruĝa kokardo sur la kolo — memoraĵo de antaŭ multaj jaroj, kiam iu blondulo esperis fariĝi mia urseto por la tuta vivo.

Simpatia aspekto de la ludilo kaj ebleco murmuri (pli prefere pepi) post premo de la ventreto igis grandan entuziasmon de miaj genevoj kaj infanoj de geamikoj, kiuj prunteprenadis ĝin por pli longa aŭ malpli longa tempo.

Dum tiuj ekspedicioj la urseto perdis piedon, ĝia densa hararo tie kaj alie maldensiĝis, la tuto fariĝis pli pala pro polvo. Sed ĉiam ĝi al mi revenadis. Mi ĝin senpolvigadis, purigis makulojn, gladis kokardon. Eĉ piedeton mi sukcesis al ĝi alkrōĉi.

Kaj ĝi sidas plu en sia anguleto, jam ne pro la donacinto, sed pro la refreŝiga konscio, ke la vera amo ĉion eltenos.

Narkotikoj

Ian julian tagmezon mi atendis tramon ĉe haltejo en centro de la urbo. Kuna-tendis ĝin ankaŭ kelkaj personoj, kiujn mi ne emis observi pensante nerveze pri esenca por mi afero, ĉu mi povos atingi la Gravan Oficejon antaŭ ol oni fermos la pordon. Dum tiuj prikonsideroj alproksimiĝis al mi mezaĝa virino, bele vestita en almenaŭ kvin nuancojn de koloro lila, kio tuj min ine ekfrapis kaj ekinteresiĝis.

Ŝi per mallaŭtigita voĉo demandis min: — Ĉu vi havas narkotikojn? Mi, ŝokita, elbalbutis ne tro decideme: — Ne, mi ne havas... Ŝi rigardis min suspekteme kaj diris: — Nu, jes. Ĉiuj diras, ke ne havas kaj ĉiuj havas. Kaj la plej malbonaj estas ĉi tiuj aeraj!

Ĉi momentevenis mia tramo. Mi envagoniĝis kaj ampleksis min some-re varmega, densa, sufokanta aero, en kiu miksiĝis odoroj de nefirmaaj parfumoj, de acida supo, kiun iu transportis en portmanĝujo, de kolbaso kun ajlo, de ŝvititaj, ne tro skrupule lavitaj korpoj. Ne povante spiri pro ĉi tiu narkotiko mi ekpensis, ke lila ulino pravis. La plej malbonaj narkotikoj estas ĉi tiuj aeraj.

La bezonoj

Sursojle de la publika necesejo salutis min simpatia, etstatura oldulineto invitante enen. Tuta, ne tro pura spaco ĉie estis ornamita per freŝaj branĉoj de pino. Ili pendis de la plafono kaj elstaris el vandoj.

La nebanala mastrino enmanigis al mi grandan pecon de la mola papero samtempe strebante regali min per kuketo el bunta plastsako. Poste tuj ŝi komencis

pian kanton.

Mi, mirigita kaj ravita — venkin-te emon al ne tiom fantazia vizito ĉi lo-ke, konstatis, ke — jes, ke ĝuste ŝi dum la kurta momento plenumis, la bazajn bezonojn de homo — sopiron al digna traktado, eblecon manĝi kaj malmanĝi, emon kontaktiĝi kun la naturo kaj kun Absoluto. Eble ĝuste ŝi estus ia plej bona ĉefministrino?

Antaŭ lavejo

Dum iu sabato, antaŭtagmeze, mi konstatis, ke nepre mi devas viziti lavejon. Kun granda pakaĵaĉo de tolaĵo mi aperis antaŭ kvartala institucio okupiĝanta pri tiuspecaj servoj por la loĝantaro. Mi ne estis sola, ankoraŭ kelkaj personoj amasiĝis en ĉi dezirata loko kaj ĉiu havis pakaĵaĉon similan al mia.

Sur pordo de lavejo pendis informo, ke sabate la priservejo laboras de horo... ĝis horo... Kvankam tempo estis ĝusta — tamen granda pendoseruro sub la surskribo liveris al ni informon ke nia peno okazis vana. Ankoraŭ momenton ni staris ne povante decidi ĉu atendi miraklon aŭ reveni hejmen, denove kun la pezaĵo.

Olda, moviĝema viro kolere ekkriis: — Kulpas SOLIDARECO kaj pastraro! Mi proponis preni nian tolaĵon kaj tuj iri demonstri al paroĥestro. La amasiĝintoj ridis. La Terura Avĉjo rigardis, kvazaŭ volus min murdi. Tamen estas agrable ekscii, ke en Pollando kulpas ĉion ne nur judoj kaj biciklistoj.

Kverkoj

En tramo, profunde ebria, proksimiĝanta al la oldeco viro demandis min, kion mi

opinias pri la nova libro de verkisto X. Ne atendante respondon li laŭte kaj kolere ekkriis: — Putinfilo! Kaculo! Kaculo! Li kverkojn vidis, kaj tie kreskis pinioj! Mi tie batalis, do mi scias. Kaculo, kaculo, putinfilo, tie pinioj kreskis kaj li kverkojn vidis! Kakulo, kaculo, li kverkojn vidis, putinfilo, kaj tie pinioj kreskis!

Kvankam ĉiuj pasaĝeroj rigardis nin gajige aŭ skandale, mi bone komprenis la kriterion. Mi akceptis entute ĝustan rankoron de tiu, kiu batalis al tiu, kiu verkis, ke batalis. Neniu ŝatas — mi ankaŭ — se iu vidas kverkojn tie, kie kreskas pinioj.

La viro de mia vivo

Marko deziras veturi kun mi al Zakopane. Petro deziras renkonti min en kafejo. La viro de mia vivo ne deziras veturi aŭ iri kun mi ien ajn. Li atendas min nur de tempo al tempo, pli prefere rare, en blanka ĉambro. Liaj helaj, severaj okuloj neofte rigardas min aprobe. Nur li rajtas diradi al mi: — Ne fumu. Ne manĝu kukojn. Denove vi faris stultaĵon. Neniam mi ofendiĝas. Estas evidente, ke mi revenos. Kaj mi revenas. Ĉiam. Nia ligo iĝas pli kaj pli forta, verŝajne ĝi jam restos firma ĝismorte. Mi, malkonkorde kun ecoj de la karaktero, fariĝis obeema kaj subigema. Mi ne scipovus lin perfidi. Li estas mia Kuracisto.

La grandioza amuzo

Irante tra la urba parko, fama krakova Planty, mi rimarkis junulon vestitan feste, laŭ moro de la subkrakovaj vilaĝoj. Iom ĉifpremita, nigra garnituro, kiun kompletigis blanka ĉemizo kun nigra kra-

vato kaj nigraj ŝuoj, malkaŝis ĉirkaŭ la poŝo grandan reliefaĵon.

Mi ne planis interparoli, sed li ĝentile diris: „Bonan tagon”, do mi devis kondukti dece kaj atendi disvolviĝon de la situacio. Li eltiris el la poŝo duonlitran botelon, en kiu restis ankoraŭ du aŭ tri kalikoj da vodko kaj favore provis min regali. Mi elkore dankis lian afablecon, sed esprimis opinion, ke tia kvanto da bonaĵo ne sufiĉus por du personoj. Li, konvinkita, mem fortrinkis la enhavon de botelo ĝis la fundo kaj forĵetis senbezonan jam ujon foren, sur la gazonon.

Evidente plifortigita li komencis rakonti al mi, ke ĝuste revenas tra Krakovo al sia vilaĝo de la nupta solenaĵo, kiu okazis en vilaĝo kuŝanta ĉe kontraŭa flanko de la urbo: — Ĉio estis elegante kaj bone aranĝita. Estis multe da gastoj, fajnaj, dancemaj knabinoj, paroĥestro faris kortuŝan paroladon, pli bonan orkestron oni venigis de alia vilaĝo. Estis sufiĉa kvanto de vodko, multege da bongusta manĝaĵo, viando en brasiko, barĉo kun terpomoj, kolbaso...

Kun grandiganta raviteco li kontinuis la rakontadon:

— Ĉi tiu nuptofesto estis vere honesta, la amuzo estis grandioza, jam en la preĝeja vestiblo ni komencis interbati. Jen, kion oni al mi faris; per tranĉilo!

Kaj li levis la mentonon. Mi devis forte strebi, por ne sveni. En loko, kie kolo kontaktiĝas kun kapo, de unu ĝis dua orelo, kuris profunda streko, vundo kovrita per apenaŭ sekiĝinta sango.

Evidente, ĝis nun mi ne havis imagon pri la grandioza amuzo.

La slava animo

Instruante Esperanton dum septembra sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino mi havis okazon ekkoni dekelkajn novajn personojn el diversaj landoj, ĉefe profesorojn kaj docentojn de ĉi tiu klerigejo. Foje, unu el ili, lingvosciencisto, moskvano, post plenumo de la akademiaj devoj invitis min kaj kelkajn kolegojn fortrinki kelkajn botelojn da bongustega, ruĝa vino.

Ni troviĝis sur granda, plena de vegetaloj balkono pendanta super kruta, mallarĝa strateto en la plej alta parto de sanmarina Citta). Kiam la mastro komencis verŝi en kalikojn la promesitan alkoholaĵon mi rimarkis, ke ĉirkaŭ la ronda tablo ariĝis du rusoj, slovako, ĉeĥo, sloveno kaj tri gepoloj. Kun la ŝerca intenco mi demandis la mastron, ĉu nur slavoj meritas lian agnoskon kaj aprobon. Li tute serioze kaj bedaŭre diris: — Mi provis inviti ĉiujn kolegojn, sed: belgo diris, ke, sen ofendo, li malŝatas vinon kaj ne intencas turmentiĝi, italoj jam pli frue invitis kelkajn belulinojn al kafejo, al germano la hepato ne permesas alkoholaĵajn ekscesojn kaj nederlandano promesis al la edzino drinki nenion kun nenio... Imagu, ĉu slavo scipovus fari al mi ion tian? Ne, slavo neniam!

Ni bonege amuzis laŭ la komuna ideo kaj komencis ŝati nin reciproke pli kaj pli. Finfine, nokte, ni forlasis la gastaman mastron. Ni descendis stumblante tra krutaj, malhelaj stratetoj al niaj pli malalte kuŝantaj tranoktejoj, strebante ne kanti laŭte. Dum tiu longa vojo (la telfero nokte ne funkcias) rememoriĝis al mi ĉiuj traktatoj kaj rimarkoj pri aparteco de la slava animo. Nun mi havas la propran kontribuon al la problemo. Almenaŭ mi

scias, kial valoris viziti San Marino. Mi tie malkovris klare kaj sendube la slavan animon, spertinte, kion slavo neniam...



Fino, dank' al Dio...

Dian kaŭzon mi devas preni, ĉar alie mi ne povus klarigi la fakton, ke post la okhora malfacila operacio en la zurika hospitalo, tuj post vekigo, mi skribis soneton kaj aldone mi surbendigis la radian elsendon.

La unuan soneton mi skribis la 1^{an} de januaro 1995 en Venecio kaj poste senĉese ĝis la lasta tago de 2006 jaro, dekdu jarojn, ses jarojn en la dudeka kaj ses jarojn en la dudekunua jarcento, ĉiutage du sonetojn, ofte pli multe, en diversaj, eĉ ekstremaj vivaj situacioj. Ne estas kroniko pri miaj dek du jaroj de mia vivo, sed nur parte spontana priskribo pri kazoj kaj personoj, kiuj min ekinteresis. Tamen, ne ĉiam estas miaj opinioj pri tiuj eventoj, eĉ se mi prenas respondecon pri miaj vortoj, alie — ne aliaj ŝuldas pri malbonaĵoj de la mondo, sed mi pri miaj priskriboj plene respondas.

Ekestis ciklo de 8784 sonetoj, en du lingvoj, en la pola kaj en Esperanto, sed ne estas tradukoj de unu al la dua lingvo (en tiu ciklo ĉiuj estas superjaroj, ĉiu februaro estas 29-taga). Parto de la ciklo estis jam eldonita libre, sed granda parto de sonetoj ne eniĝis pro la kondiĉo, ke oni povis tage enhavigi nur unu soneton. La ciklo de sonetoj posedas kaŝitan ordon, ĉar oni povas legi ĝin en jaroj horizontale kaj en monatoj vertikale, pro tio ĝi estas jam finita, ĉar unu jaro ne havas ja dek tri kaj pli monatojn. Libro de sone-

toj SNETADO estis pripensita nur por interreto kaj nur tiel estas eldonita; aliajn eldonojn mi ne antaŭvidas.

En mia poezio mi postiras antikvajn poetojn, tio signifas, ke ĉio, kion mi verkas estas kantebla kaj eĉ se mi parte deklamas miajn poemojn, ili ankaŭ taŭgas por ilin kanti. Ĝuste pro tio ili ne povas esti tradukitaj al aliaj lingvoj, ĉar miaopinie ili estas maltradukeblaj. Mi elpensis tial sonetoidon, literaturan formon, je kiu oni povas miajn sonetojn traduki, konsekvante enhavojn sen rimoj.

Oni povas miajn poemojn kopii por persona uzo, sed oni ne povas ilin publikigi.


Mi revenas al la komenco de mia komentario, ĉar la ekeston de tiu ciklo da sonetoj oni povus klarigi kaj demonstri racie, sed kial? Poezio ne estas racia, ĝi estas spirita. Mi ankoraŭfoje diras, ke mi finis ĉi tiun ciklon da sonetoj dank' al Dio, kaj ankaŭ dank' al ĉiuj bondeziremaj homoj, kiuj havis paciencon kaj volis ilian scion kun mi dividi, donante interesajn konsilojn.

Dankema

Jan Stanisław Skorupski

Venecio, la 31^{an} de decembro 2006

La tria eldono de fama, humura libro de Izrael Lejzerowicz, ĵus aperis (kaj estas aĉetebla) ĉe la Eldonejo HEJME. Prezo por poloj: 8 zł (plus sendokostoj); por eksterlandanoj distribuas la Libro-servo de UEA.



Stefan Żeromski

Sur ferdeko...

Sur ferdeko de la ŝipo iranta de Brunnen al Fluelen interpremiĝis multaj turistoj. Estis tie reprezentantoj de naciecoj franca, germana, itala, angla kaj aliaj. Frumateno etendiĝis super montoj kaj ĉirkaŭvolvis tiun tutan hejmon, kiel malesprima kortuŝo. La kopulo Uriröthstock staris inter noktaj nuboj kvazau mistera estaĵo en fumo de incensaĵoj. Dekstren kaj maldekstren brilis en suno glaciaj pintoj. En profundo, ĉe akvoj mem, serĉis ancorau kaŝejon nokto, de ĉie forpelita. Piceoj, aveluoj kaj betuloj ĉe bordo premis ĝin inter si, kiel eble pli. Ili malaltigis trunkojn eĉ ĝis la akvo mem kaj senparoligaj de miro rigardis en proprajn respeguliĝojn naskiĝantajn en profunda superakvigo. Longa golfo, kiel senviva, senmova, violblua akvospegulo, kuŝis sub eta nebulo. Erarvagaj kaj supraj nebutoj ekstaradis el diafanaj fluoj kaj iradis super akvujojn. Oni vidis, ke fore, fore, en mallumigita, blua valo vagas kaj krozas super kuŝanta en kvieteco lago ombroj kaj fantomoj eksongitaj de Schiller, kiu ĉi tie revadis.

Dum iu minuto sur unutona koloro de akvoturnejo okazis strangege, helverda makulo kun randoj forte desegnitaj kaj kuregis rapide kvazau libera Tellow-bato. La ŝipo mergiĝante en profundaĵon ŝancelis ĝian ekdormitan surfacon kaj tiris malantau si kvazau malaĉajn flugilojn el ondoj plenbalancitaj. Tiuj briletantaj, flagrantaj, malgrandaj ondoj iris malantaŭen, ĉiam pli malrapide, al nigraj bordoj, dorlotante reciproke unuj kun aliaj.

Tuta antaŭo de la ferdeko estis plena de svisaj infanoj. Eniĝis tie lernejo el iu vilaĝo de la kantono Appenzell, faranta laŭkutiman someran migradon transverse de sia lando. Tio estis knaboj kaj knabinoj diversaĝaj, filoj kaj filinoj de terkulturantoj kaj etaj burĝoj, paŝtistoj kaj komercistoj, laboristoj kaj servantoj, novriĉuloj kaj mizeruloj. Ĉiuj estis jam sufiĉe lacigaj, sunbrunitaj, kovritaj per polvo.

Prezidis al ili instruisto, hajb¹ kun mojoj de farma servisto, kun vizaĝo lentuga, vulgara, kovriĝita per senkolora hararo. Estis tamen en tiu vizaĝo io, kio distingas pedagogon tiean el plebo. Sur li vidiĝis alkiutimiĝo paroli veron malfermitan kaj senmakulan, ĉiam kaj ĉie. Tiu devo, tiu bela frukto de la alta kulturo forlavas dum jaroj, kiel senlaca akvo kornan grundon, malvirtojn de individua karaktero, denaskajn turpojn kaj signas vizaĝojn per stranga rideto, kian oni povas rigardi verŝajne nur sur malnovaj bildoj de Bernardin Luini. Tio estas vizaĝoj naivaj, kiuj ne sciipovas mensogi.

Tia lernejo kie tio eblas marŝas, iam vojaĝas trajne au ŝipiras. En nordaj regionoj ĝi vizitas fabrikojn, famajn metiejojn, muzeojn, preĝejojn, belajn urbojn ĉe lagoj, sidejojn de vivo, scio kaj laboro; homemitulajn vilaĝojn, malnovajn ruinojn kaj finfine senvivajn dezertojn sur altaj montoj, kie sombra glacio dormas en silentigo eterna. Pli maljunaj ariĝas en siaj verdaj skatoloj drogherbojn kaj insektojn — pli junaj sur kampoj Naefels, Morgarten, sempach aŭdigas lecion de eventoj kaj lernas legendojn, kiuj estas kvazau sapiroj de la homaro.

Kiam ili transpaŝas la altan gotardan pinton, kiam malsupreniras al bela valo de Tessin, homoj parolantaj framdan lingvon, italoj nigraj kaj vivaj akceptas ilin kun supresternitaj brakoj — ili do estas iliaj fratoj.

Kiam post longa pilgrimado ili troviĝas en la malgaja Rodan-valo, en lokoj, kie homoj parolas franclingve, ankau tie ilin oni akceptas kun amo — ĉar tio ankau estas iliaj fratoj.

Kiam la ŝipo irinte venis antau Gruetli, eksonis la bela kanto de tiaj infanoj. Turnitaj per vizaĝoj al fierega krutaĵo de la senmortiga roko, ili kantas:

Von ferne siĝ herzlich gegruesset,
Du stilles Gelaende am see...².

Fremdlandanaj vojaĝantoj ariĝis ĉirkaŭ malgrandaj kantistoj kaj kun plezuro aŭdadis konsentigon ĥoron. Tie kaj ie eliradis el aro da homoj la laŭdo-vorto. Iu germano mallaŭte aplaŭdis, iu svelte damo kun kortuŝo ekflustris al kamarado: oui, c'est beau...³. La pergamena vizaĝo de anglo paliĝis per melankolia rideto.

Flanke staris kelkaj junuloj. Iliaj vizaĝoj estis tre tristaj kaj pupilaj vualitaj per larmoj.

1. Hajb (dialekto germ.-svisa) — pole krudulo.

2. Naefels, Mergarten, sempach — lokoj memorigitaj per la venkoj de svisoj batalintaj kontraŭ aŭstroj.

3. „Von ferne..” (germ.) — el malproksimo mi salutas vin varme, kvieta lando ĉe lago.

4. Oui, c'est beau.. (fr.) — jes, tio estas bela.

Stefan Ŝeromski, *Opowiadania*, Książka i wiedza, Warszawa 1981; „Na pokładzie”, str.88–90.

Esperantigis: Stanisław Śmigielski